

EL POPOLA


ĈINIO

12
1977


中國報道



La Memorhala de




Prezidanto Maŭ



La norda salono de la Memorhalo de Prezidanto Maŭ

伟大的领袖和导师
毛泽东主席
永垂不朽






La majesta salono en kiu loki-
ĝas la ĉerko de Prezidanto Maŭ

Kun la Memorhalo de Prezidanto
Maŭ Tian-anmen-placo aspektas
ankoraŭ pli impona kaj majesta.




Parto de statuaro





Unu el la statuaroj



Faksimilo de manskribita poemo de Prezidanto Maŭ gravurita en muro de la suda salono





Zaŭjuan de Jan-an

**Solena kunveno por memorigo pri
la unua datreveno de la forpaso
de la granda gvidanto kaj
instruisto Prezidanto Maŭ kaj por
la inaŭguro de la Momerhalo de
Prezidanto Maŭ**

La kunvenejo









Prezidanto Hua Guofeng kaj Vicprezidantoj Je Jianjing, Deng Hiaüping, Li Hiannian kaj Vang Donghing respekte prezentis florkronojn kaj observis silenton antaŭ la statuo de Prezidanto Maŭ.



Prezidanto Hua faranta gravan paroladon en la kunveno.



Amasoj de la ĉefurbo kun respekto rigardas la korpon de Prezidanto Maŭ.



La Memorhalo de Prezidanto Maŭ (la suda flanko)

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO P.O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

Ĝenerala distribuanto: Guozi Shudian P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

- KOVRILO: 1. Parto de statuaro
antaŭ la Memor-
halo de Prezidanto
Maŭ
4. Prezitado sur
akvo

Enhavo

Renkonte al la Novjaro	2
La Memorhalo de Prezidanto Maŭ	4
Dum laboro ĉe Prezidanto Maŭ	7
En la familio de Prezidanto Maŭ	11
Vizito al la Komunumo de Ĉina-Rumana Amikeco	13
La fama Lugoŭkiaŭ	17
TEATRAĴOJ KAJ FILMOJ: Danco dediĉita al martiro	18
Al la legantoj	22
Sekretario de la partia komitato de gubernio	23
KURANTAJ AFEROJ	25
Serĉi akvofonton por kamparanoj	26
En Huhehoto	29
Esperantaj novaĵoj	34
Li denove iros sur la laboran postenon	34
“Vi devas esti singardemaj!”	36
POR AMIKECO: Du pikturaj ekspozicioj	37
ĈINAJ NACIECOJ: La luobaoj	39
EL ĈINA MODERNA HISTORIO: La okcidentiga movado de King-dinastio	41
TRA ĈINIO: La fonto de Jangzi-rivero	43



Renkonte al la Novjaro

de Hujucz, prezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo

Karaj geamikoj konataj kaj nekonataj en malproksimaj landoj, ĉi tie mi sendas al vi korajn novjarajn bondezirojn.

La Novjaro alportas al ni novan esperon kaj rememorojn pri la pasinteco.

Permesu, ke mi iom parolu pri mia pasinta sperto.

1913 estis la jaro, en kiu mi fariĝis "civitano" de Esperantujo.

Tiam mi ankoraŭ ne finis mian studon en mezlernejo. La ĉina feŭdisma regado, kiu ekzistis pli ol 2,000 jarojn, jam estis unuafoje frakasita de la revolucio gvidata de Sun Jatsen, kaj tio estigis skuon en la Oriento. Sed la espero de la ĉina popolo baldaŭ krevis. Ili daŭre vivis en malluma socio duon-feŭda kaj duon-kolonia kaj restis en suferado.

Estas Esperanto, kiu malfermis por mi fenestron en la mallumo, kaj mi ekvidis la mondon diverskoloran. Mi ne plu estis sola. Mi amikiĝis kun multaj eksterlandanoj.

Sed kiel naiva kaj scio-manka mi estis. Tiam ŝajnis al mi, ke kiam la homoj havas Esperanton je sia dispono, ili tuj ĝuos pacon kaj feliĉon.

La fakto tute ne estis tia. Post nelonge la Unua Mondmilito en la homa historio eksplodis. La milit-fajro etendiĝis de la Okcidento ĝis Ĉinio, kaj la tiama japana imperiismo okupis nian Ŝandong-provincon.

Iom pli poste, la unua socialisma revolucio en la homa historio akiris venkon en Rusio. La Oktobra Revolucio alportis Marksismen-Lenin-

我这是这句话：为果以世界强
为形式，而载以莫正国深之
义之过美正革命之道，那末
世界法定的不行的，是应该学的

一九一九年
一月九日

La vortoj skribitaj de Prezidanto Maŭ Zedong por la Jan-anaj esperantistoj

ismon al Ĉinio, kaj tio prilumis por la ĉina popolo la vojon de liberigo montritan de Prezidanto Maŭ Zedong.

La estonteco estis plena de lumo, sed la vojo antaŭen estis ankoraŭ zigzaga. En Ĉinio okazis longdaŭraj internaj militoj inter la tiranaj militaristoj kaj perfido de Ĉiang Kajŝek al la revolucio. La faŝistaj ĉefoj Hitler, Mussolini kaj Tojo okupis multajn landojn en la Okcidento kaj Oriento.

La popolo kaj nur la popolo estas la movforto de la historio. La Dua Mondmilito, t.e. la milito kontraŭ faŝismo, donis pezan baton al la malnova mondo. Poste fondiĝis la Ĉina Popola Respubliko. Multaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko havis novan fizionomion. Koloniismo kaj imperiismo ŝajne venis al sia lasta tago.

Tamen, la longa batalo de la homaro por sinliberigo ankoraŭ ne finiĝas. La tempodaŭro de unu generacio jam pasis, sed imperiismo kaj nova kaj malnova koloniismo ankoraŭ daŭre ekzistas, kaj ekzistas ankaŭ ekspansiismo kaj hegemoniismo. Perfiduloj forlasis la gigantan entreprenon de Lenin. Ĉio iras ĝuste kiel diris la granda ĉina verkisto Luŝin: "Nevidebla estas la fino de la batalo kaj ankoraŭ ripetiĝos la malnova melodio."

Dum tiuj ĉi longaj jaroj mi ne povis ne senti min feliĉa, ĉar mi konatiĝis kun granda nombro da esperantistoj-amikoj en multaj landoj malproksimaj. Intertempe de la du mondmilitoj mi vojaĝis al Parizo, Ĝenevo, Londono, Berlino, Varsovio kaj Moskvo. Do inter miaj amikoj estas tiuj, kiujn mi komencis koni jam antaŭ multaj jaroj. Sed la plejparton el ili mi tamen konas nur dank' al tiu ĉi revuo El Popola Ĉinio. Kun ili ĉiuj mi ĉiam restos en sincera amikeco. Ĉi tie mi volas diri al miaj karaj, malproksimaj amikoj konataj kaj nekonataj, ke kun Esperanto kiel nia komuna komunikilo mi neniam forgesos ilin.

La alveno de la Novjaro inspiras en ni pluan esperon pri la mond-paco kaj homa feliĉo. Samtempe la aktuala vivo instruas al ni, ke nia espero povos transformiĝi en realon, nur se ĉiuj



Kamarado Hujucz, fotita en la Redakcio de "Internaciisto", Berlino, en januaro, 1931.

popoloj en la mondo unuiĝos kaj senlace batalos. La lernado kaj utiligo de Esperanto estos signifo-plena, nur se ni servigos nian lingvon al la unuiĝo kaj batalo de la popoloj.

Antaŭ tridek ok jaroj nia granda gvidanto kaj instruisto Prezidanto Maŭ Zedong skribis en sia kaverndomo en Jan-an: **"Mi dirus ankoraŭ la samon: Se oni prenas Esperanton kiel formon por porti la ideon vere internaciisman kaj la ideon vere revolucionan, do Esperanto povas esti lernata kaj devas esti lernata."**

Prezidanto Maŭ jam foriris de ni. Tamen Maŭzedongpenso restos por ĉiam, kaj lia instruado estas eterna vero.

Karaj amikoj, antaŭ ni staras la fakto, ke Prezidanto Maŭ ne foriris de ni. Li estas pace kuŝanta en la memorhalo en Pekino fronte al la granda slogano sur la muro de Tian-anmen-pordego:

"Vivu la granda unuiĝo de la popoloj de la mondo!"

La Memorhalo de Prezidanto Maŭ

EN la 9-a de septembro, 1977, sub prezidado de Prezidanto Hua okazis la inaŭguro de la finkonstruita Memorhalo de Prezidanto Maŭ. De tiam ĉiutage dekmilo da homoj ĝin vizitas por esprimi sian respekton al la korpo de Prezidanto Maŭ.

La grandioza konstruaĵo kun nacia stilo karakteriziĝas per simpleco de formo, modesteco de koloroj kaj majesteco de la tuto. Post ĝia finkonstruo duobligis la areo de Tian-anmen-placo. Super la norda pordo de la memorhalo troviĝas la blanka marmorplato kun ideografiaj signifantaj "Memorhalo de Prezidanto Maŭ" skribitaj de Prezidanto Hua Guofeng. Ambaŭflanke de ĝia norda enirejo staras du grandaj statuaroj, kiuj prikantas la grandajn kontribuojn de Prezidanto Maŭ.


Enpaŝinte la nordan salonon, la vizitantoj povas vidi pli ol 3 metrojn altan, tre versimilan blankmarmoran statuon de Prezidanto Maŭ sidanta kun bonkora rideto en sofo. Post la statuo estas giganta bildo "Montoj kaj Riveroj de la Patrolando" brodita de Jantaj-aj metiartistoj de Ŝandong-provinco per lanfadenoj laŭ la originala olepentraĵo.

La salono samtempe povas akcepti 600-700 vizitantojn por fari memoran aktivadon antaŭ eniro en la centran salonon. En la salono staras kvar elegantaj ruĝaj marmoraj kolonoj supre inkrustitaj per Tianŝan-a blanka jado de Hingiang.

Sur la plafono estas instalitaj 110 sunfloraj lampoj prilumantaj la statuon de Prezidanto Maŭ kvazaŭ sunfloroj sin klinas al la suno.

Trapasinte orvejnajn nanmu-lignajn pordojn ambaŭflanke de ĝi oni turniĝas suden kaj eniras

Angulo de la memorhalo





Lanfadena brodaĵo "Transpaso de Neĝmontaro" en ripoza salono

la centran salonon. Tiu salono longas en direkto de sudo-nordo 16.5 metrojn kaj larĝas en direkto de oriento-okcidento 11.3 metrojn. La orienta, okcidenta kaj norda muroj estas tegitaj per nanmu-ligno, kaj tiu rara ligno estis kolektita kaj konservita de homoj speciale senditaj de Ĉefministro Ĝou Enlaj. La suda muro estas

ornamita per blanka marmoro en kiu estas gravuritaj oraj ideografiaĵoj signifantaj "Eternan Gloron al la Granda Gvidanto kaj Instruisto Prezidanto Maŭ Zedong!" La kristala ĉerko kun la korpo de Prezidanto Maŭ estas metita en la mezo de la salono. Diverskoloraj floroj ĉirkaŭprenas la trapezan ĉerkan soklon el nigra



La norda pordo de la memorhalo



Statuaro okcidente de la suda pordo de la memorhalo

granito de la monto Tajŝan, kio simbolas ke la kontribuo de Prezidanto Maŭ estas pli granda ol Tajŝan. La kvar flankoj de la soklo estas tegitaj respektive per la emblemoj de la Partio, la nacio kaj la armeo kaj la naskiĝa kaj morta jaroj de Prezidanto Maŭ 1893—1976. La korpo de Prezidanto Maŭ estas kovrita per ruĝa partia flago. Li estas en griza uniformo ŝatata de li dum sia vivo. Lia mieno ankoraŭ restas tiel afabla kiel antaŭe. Vido de la korpo de Prezidanto Maŭ estas tre emocia kaj multe pensiga . . . La ornamajoj de la pordoj, fenestroj kaj fenestrokurtenoj de la konstruaĵo estas faritaj en la formo de sunfloro, umefloro kaj rodeo.

Sur la blanka marmora muro en la suda salono estas gravurita la manskribo de la poemo de Prezidanto Maŭ “Responde al Kamarado Guo Moĵuo—Laŭ melodio Man-giang-hong”. La oraj fortaj ideografiaĵoj vekas ĉe la vizitantoj senliman kuraĝon. En la ripozaj salonoj de ambaŭ flankoj pendas pentraĵoj pri Ŝaŭŝan, la Instituto de Kamparana Movado de Kantono, Gिंगgang-montaro, Zunĵi, neĝkovrita monto kaj marĉa herbejo, la Ĝardeno de Jujubarboj, Bejdajhe, Ĝongnanhaj kaj aliaj memorin-

daj lokoj de la ĉina revolucia historio, kaj manskriboj de la «Longa Marŝo» kaj aliaj grandiozaj poemoj de Prezidanto Maŭ. Tiuj eminentaj belartaĵoj portas la vizitantojn en la jarojn, kiam la ĉina popolo bataladis sub la gvido de Prezidanto Maŭ.

Ankaŭ antaŭ la suda pordo de la memorhalo troviĝas du grandaj statuaroj, kiuj montras ke oni heredas la proletan revolucion aferon komencitan de Prezidanto Maŭ. Ili, diferencaj de tiuj antaŭ la norda pordo, tamen formas harmonian tuton kune kun ili.

La grandioza memorhalo estas kristalo el la klopodoj de la okcentmiliono popolo de Ĉinio. Multaj fame konataj specialistoj kaj laborantoj de la projekta, sciencesplora, higiena, belarta kaj aliaj fakoj de nia lando kontribuis sian saĝon por ĝi. La heroaj konstruantoj plenumis la skulptadon de la statuo de Prezidanto Maŭ, la instaladon de lia kristala ĉerko kaj ornamadon de specialaj metiartaĵoj kaj aliajn penigajn kaj delikatajn taskojn je la plej alta rapideco kaj plej bona kvalito. La kristala ĉerko estas tute senmakula. La halo ĉiam memorigos la popolon pri Prezidanto Maŭ de generacio al generacio.

Dum laboro ĉe Prezidanto Maŭ

En septembro de la kuranta jaro, okaze de la unua datreveno de la forpaso de Prezidanto Maŭ Zedong, iuj laborantoj ĉe Prezidanto Maŭ verkis por rememori la neforgeseblan tempon pasigitan ĉe Prezidanto Maŭ kaj rememori la revolucion gvidanton kaj instruiston. Ĉi sube estas kelkaj fragmentoj.

— La Red.

“Admonu Prezidanton Maŭ unue preni manĝon”

En aprilo, 1949, ĝuste kiam Prezidanto Maŭ komandis la Popolan Liberigan Armeon en gajno de la fina venko de la tutlanda liberiga milito, Li Giagi estis asignita labori kiel gardisto ĉe Prezidanto Maŭ. Li estis tre maltrankvila pro ke Prezidanto Maŭ dormis ĉiutage nur 2-3 horojn kaj kelkfoje eĉ laboris tutan nokton. Iun tagon, li trifoje petis Prezidanton Maŭ manĝi, sed Prezidanto Maŭ ne havis tempon por tio. Informiĝinte pri tio Vicprezidanto Ĝoŭ Enlaj instrukiis telefone: “Admonu Prezidanton Maŭ unue preni manĝon kaj diru al li ke tio estas mia peto!” Kaj Li Giagi rapide portis tason da hordea griaĵo al Prezidanto Maŭ, sed la lasta diris serioze: “Mi jam manĝis, ĉu ne?” Aŭdinte tion Li Giagi eklarmis pro emociiĝo kaj diris: “Vi prenis nur matenmanĝon, kaj de tiam jam forpasis dekelk horoj!” Vidinte ke liaj okuloj pleniĝis je larmoj, Prezidanto Maŭ diris ridetante: “Bone, mi tuj manĝu, tuj.” Post nelonge Li Giagi venis por forporti la manĝilaron kaj trovis, ke la manĝaĵo restis netuŝita. Li diris maltrankvile: “Vicprezidanto Ĝoŭ telefonis al mi, ke vi unue prenu manĝon.” Nur tiam Prezidanto Maŭ haste manĝis duontason da griaĵo. Por laboro Prezidanto Maŭ nur dufoje manĝis hordean griaĵon dum tuta diurno.

Je la oka de la sekvanta tago, Prezidanto Maŭ ĝoje eliris el la ĉambro kaj diris al Li Giagi ke

li tuj alportu la ĵurnalon. Sed la ĵurnalo ankoraŭ ne estis presita, Li Giagi do donis al li informilon. Prezidanto Maŭ kunvokis la gardistojn kun rideto: “Venu kaj mi legos por vi informon pri la liberigo de Nankino.” Nur tiam ili sciigis, ke Prezidanto Maŭ lastatempe maldormis tutajn noktojn por direktadi milionon da armeanoj transiri Jangzi-riveron kaj renversi Ĉiang-Kajŝek-klikon.

*Li Giagi (la meza) rakontas pri
manskribaĵo de Prezidanto Maŭ.*



Aŭskulti raporton en vagono

Matene de la tria de februaro, 1953, vagonaro eniris en la stacion de Hingtaj de Hebej-provinco. Sekretario de la gubernia komitato de la Partio Ĝang Jumej kiu staris sur la kajo ankoraŭ ne sciis, kial la supera instanco venigis lin al la stacio por atendi tiun vagonaron. Li estis envagonigita kaj la vagonaro ekmoviĝis. Iu gvidanta kadro diris ridetante al li: "Prezidanto Maŭ inspektas diversajn lokojn de la lando kaj hodiaŭ li volas aŭskulti vian raporton pri kooperativismo en Hingtaj-gubernio."

Ĝang Jumej, kiu laboris kiel paŝtisto kaj kamlaboristo de bienulo en la malnova socio, sentis ekstremajn honoron kaj feliĉon, ke li povas raporti al Prezidanto Maŭ pri sia laboro. Antaŭ ol li forviŝis siajn larmojn Prezidanto Maŭ jam eliris el la kunvena kupeo kaj Ĝang Jumej tuj alproksimiĝis renkonte kaj forte manpremis kun li.

"Ĉu vi estas kamarado Ĝang Jumej?" Prezidanto Maŭ kondukis lin en la kunvenan kupeon tirante al li la manon, kaj intime pridemandis al li, kian aĝon li havas, kiam li komencis labori, kaj ĉu li iam vizitis lernejon. Post tiuj demandoj li diris: "Nu, bonvolu paroli al mi pri la kooperativismo de via gubernio."

La emociita kaj streĉa animo de Ĝang Jumej nun kvietiĝis kaj li komencis sian raporton. Kiam li diris ke du vilaĝoj kooperativigis ĉiujn siajn familiojn kaj rapide akiris bonan rikolton, Prezidanto Maŭ demandis: "Kial tiuj du vilaĝoj povis frue kaj bone efektiviĝi kooperativismon?" Ĝang Jumej diris: "Antaŭe, tie estis revolucia bazloko, la gvidantoj estas kapablaj, la popolamasoj havas relative altan politikan konscion kaj la politikoj de la Partio estas tre bonvenaj al ili." Prezidanto Maŭ diris ridetante: "Jes! dank' al plifortigo de la gvido, sinapogo al la forto de la amasoj, alpreno de aktivaj kaj konvenaj paŝoj kaj al starigo de modelaj ekzemploj, nia kooperativa afero povas rapide disvolviĝi." Prezidanto Maŭ demandis ankaŭ pri multaj konkretaj problemoj en la movado de kooperativigo, kaj Ĝang Jumej respondis ĉiujn demandojn.

Je la unua posttagmeze, la vagonaro atingis Anjang-stacion de Henan-provinco, Prezidanto Maŭ tagmanĝis kune kun Ĝang kaj post tio daŭre interparolis kun li, kaj la lasta raportis ankaŭ pri la virina laboro de la tuta gubernio kaj la vivo de la amasoj. Prezidanto Maŭ tre atentis la virinan laboron instrukciante, ke oni devas mobilizi la vastajn amasojn de virinoj al produkta laboro, rekompenci per egala pago saman laboron de virinoj aŭ viroj, efektiviĝi



Ĝang Jumej (la unua de dekstre)

Lan Baŭhua prezentas foton de Prezidanto Maŭ kun gardistoj.



veran egalecon de viro kaj virino, por ke tiuj faru kontribuon al la socialisma konstruado.

La raportado de Ĝang Jumej daŭris ĝis la sepa posttagmeze, kaj tiam la vagonaro jam atingis Ĝengĝoŭ-stacion. Post vespermanĝo Prezidanto Maŭ diris: “Jumej, hodiaŭ vi faris bonan raporton.” Poste li demandis, ĉu li faris vojaĝon antaŭe, ĉu li havas la intereson vojaĝi aliloken kune kun li. Kvankam Ĝang ne volis foriri de sia gvidanto, tamen li diris kun dankemo: “Mi devas tuj reveni por informi la amasojn pri viaj intima prizorgo kaj gravaj instrukcioj. Ni nepre efektivigos kooperativismon kiel eble plej rapide laŭ via instruo.” Prezidanto Maŭ kapjesis. Ĝang Jumej stariĝis por adiaŭi Prezidanton Maŭ kaj la lasta akompanis lin ĝis la pordo de la vagono.

Deziro de la jaŭ-nacieca popolo

La jaŭ-nacieca kadro Lan Baŭhua, kiu laboris tri jarojn kiel gardisto de Prezidanto Maŭ, rememore rakontis pri la zorgo de Prezidanto Maŭ al la jaŭ-nacieca popolo. Estis la jaro 1955. La jaŭ-oj de Du-an-gubernio de Guanghi-provinco postulis aŭtonomecon, kaj Prezidanto Maŭ sendis lin al sia hejmloko por fari enketadon. Reveninte al Pekino li akurate faris raporton al Prezidanto Maŭ.

Post la fondiĝo de la Du-an-a Jaŭ-a Aŭtonoma Gubernio Prezidanto Maŭ refoje sendis Lan

Baŭhua al tiu loko por enketi. Reveninte li raportis al Prezidanto Maŭ, ke jaŭ-oj ĝuas apartan prizorgon de la Partio kaj la registaro kaj ili ĉiuj estas kontentaj. Prezidanto Maŭ tre ĝojis aŭdinte tion kaj demandis, kiom da jaŭ-oj troviĝas en Du-an-gubernio, ĉu la guberniestro estas jaŭ-o, kian aĝon li havas kaj ĉu en la gvidantaroj de la niveloj de kooperativo, distrikto kaj gubernio sin trovas virinaj kadroj. Aŭdinte ke en iuj lokoj ankoraŭ ne estis virinaj kadroj, Prezidanto Maŭ diris, ke la virinoj konsistigas duonon de la homaro, kaj ne povas elvolviĝi la latentata forto de la virinoj, se oni ne instalas virinajn kadrojn.

Prezidanto Maŭ tre respektis la lingvojn de nacimalplimultoj. Foje, dum manĝado Prezidanto Maŭ demandis Lan Baŭhua fingromontrante pokalon: “Jaŭ-a kamarado, kiel oni diras ‘trinki’ kaj ‘manĝi’ en la jaŭ-a lingvo?” Lan Baŭhua diris tion, kaj Prezidanto Maŭ tuj lin imitis kaj notis la prononcon en sian kajeron. Post unu jaro Prezidanto Maŭ refoje vidis Lan Baŭhua kaj diris la du vortojn en la jaŭ-a lingvo kaj demandis lin, ĉu li ĝuste prononcis. La lasta diris ĝoje: “Ĝuste!” Poste Prezidanto Maŭ demandis la prononcon de multaj aliaj vortoj de la jaŭ-a lingvo. Tamen ankaŭ Lan Baŭhua ne scipovis paroli iujn vortojn de la jaŭ-a lingvo kaj diris al Prezidanto Maŭ: “Mi forlasis la hejmlokon multajn jarojn, tial mi ne povas bone

paroli la jaŭ-an lingvon, sed maljunuloj en la hejmloko povas." Prezidanto Maŭ zorge atentigis: "Venontfoje vi restu pli longe en via hejmo por lerni la jaŭ-an lingvon. La nacia lingvo ne devas esti perdita!"

En majo de 1956 Lan Baŭhua refoje raportis pri sia hejmloko. Prezidanto Maŭ demandis: "Ĉu al via hejmloko mankas greno? Ĉu sanaj estas viaj samlokanoj? Ĉu ruĝaj estas iliaj vangoj? Kiel funkcias la kooperativo? Kiel kreskas la plantaĵoj?" Lan Baŭhua respondis ĉiujn tiujn demandojn. Prezidanto Maŭ demandis fine: "Ĉu ĉion tion vi vidis propraokule aŭ aŭdis de aliaj?" Poste li diris signifoplene: "Antaŭe ni vivis en la kamparo, kaj nun en urbo; tamen ni ne devas forgesi la kamparanojn kaj iliajn malfacilojn!"

Lan Baŭhua diris kun larmoj: "Prezidanto Maŭ vere estas savanto de nia diversnacieca popolo! Nur dank' al la Partio kaj Prezidanto Maŭ mi malriĉa knabo povas havi la hodiaŭan feliĉan vivon."

"Ĉu estas pretaj la objektoj por la Printempa Festo?"

Antaŭvespere de iu Printempa Festo laborantoj ĉe Prezidanto Maŭ estis preparantaj objektojn por la Printempa Festo. Prezidanto Maŭ subite diris, ke li volas iri al la ĉirkaŭurbo de Pekino. Iu kamarado diris: "Ho bedaŭrinde, ni ne preparis por tio." Prezidanto Maŭ diris ridetante: "Nur mallongan tempon, ne estas necese fari preparon!"

Ni akompanis Prezidanton Maŭ al la okcidenta antaŭurbo de Pekino. La aŭto preterpasis iun vilaĝon. Vidinte pordon malfermitan Prezidanto Maŭ haltigis nin kaj eniris la domon. Tie loĝas familio de malriĉkamparano. En la domo troviĝis nur avino. Ŝiaj infanoj iris rigardi iluminaĵojn. Vidante ke la venanto estas Prezidanto Maŭ la avino tiel emociiĝis, ke ŝi povis diri nenion. Ŝi nur viŝadis la randon de la terlito por ke Prezidanto Maŭ sidiĝu. Prezidanto Maŭ prenis la manon de la avino kaj kune sidiĝis. Li demandis unue: "Ĉu estas pretaj la objektoj por la Printempa Festo?" La avino sentis varmon

en la koro kaj diris al Prezidanto Maŭ: "Ĉio estas preparita, ĉion ni dankas al Prezidanto Maŭ!" Pririgardante la pretigitajn objektojn Prezidanto Maŭ faris zorgajn pridemandojn kaj fine demandis, ĉu ŝi ankoraŭ havas malfacilojn en la vivo. Danke manpremante kun la gvidanto la avino diris: "Ne, nenian malfacilon ni havas, nia tuta familio vivas tre bone!"

Prezidanto Maŭ forlasis tiun familion kaj inspektis du aliajn vilaĝojn. Jam brilis ruĝaj lanternoj kaj krakadis fajraĵoj kiam la aŭto reverturis en la urbon de Pekino.

Neforgesebla memoraĵo

Post grava malsaniĝo de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kuracisto de la Ĝenerala Hospitalo de ĈPLA Giang Siĉang partoprenis en lia kuracista grupo. Li rememoris, ke kvankam Prezidanto Maŭ suferis de grava malsano, tamen li ĉiam tenis la tutlandan popolon en la koro, kaj zorgis pri la popoloj de la tuta mondo. Eĉ tri monatojn antaŭ sia forpaso Prezidanto Maŭ ankoraŭ intervidiĝis plurfoje kun fremdlandaj gastoj. Oni admonis lin ripozi, ĉesigi sian laboron de eksteraj aferoj, sed ĉiufoje Prezidanto Maŭ malkonsentis tion kapskuante.

Prezidanto Maŭ tre zorgis ankaŭ la kuracistan grupon. Foje, post intervidiĝo kun fremdlanduloj li proponis fotiĝi kun la kuracista grupo. La lasta ĝojegis pro tio kaj interprete sidis ambaŭflanke de la gvidanto. Tuj antaŭ la fotado Prezidanto Maŭ vidis ke Giang Siĉang venis deekstere kaj lasis lin sidiĝi ĉe li.

"Tio estas neniam forgesebla memoraĵo," diris Giang Siĉang. "Prezidanto Maŭ tute dediĉis sin al la popolo." En malsano li daŭre laboris kaj lernis, eĉ kiam kuracistoj faris al li kuracon, li ankoraŭ legis dokumentojn aŭ librojn sidante en sofo aŭ kuŝante en lito. Eĉ kiam la malsano ege graviĝis kaj liaj brakoj ne povis moviĝi libere, li ankoraŭ petis aliajn legi por li ĵurnalojn. Same kiel la grandaj instruistoj Marks kaj Lenin Prezidanto Maŭ batalis ĝis la lasta spiro por la komunisma afero de la homaro. La brila ekzemplo de Prezidanto Maŭ ĉiam stimulos nin antaŭenmarŝadi senĉese.

En la familio de Prezidanto Maŭ

EN decembro de 1926, mi venis al la familio de Prezidanto Maŭ kaj Kamaradino Jang Kajhuj por labori ĉe ili kiel vartistino. Ekvidinte min, ili ambaŭ ekstaris kun rideto por min bonvenigi. Kamaradino Kajhuj diris al mi: "Vi laboros kiel nia helpanto, ni estas egalaj, ni estas amikoj." Tion aŭdinte mi sentis kvazaŭ mi venus en alian mondon. Mi naskiĝis en familio de malriĉa kamparano, almozpeta de mia infaneco kaj fariĝis infanfianĉino apenaŭ povante piediri. Pro malriĉeco mi devis labori kiel servoknabino kiam mi estis nur dekkelkjara kaj la mastroj traktis min kiel plebanon. Sed la novaj mastroj diris, ke ni estas egalaj. Ili ja estas plej bonaj homoj en la mondo!

Mi pasigis 4 jarojn en la familio de Prezidanto Maŭ kaj Kamaradino Jang Kajhuj. Dum tiu periodo mi vivis kaj batalis kun ili en pluraj lokoj, persone spertis ilian prizorgon al mi kaj proprakule vidis, kiel multe da malfacilojn suferis, kiel energie laboregis kaj kiom multe da danĝeroj travivis nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj multaj aliaj revoluciaj kamaradoj por la revolucia afero de la ĉina popolo kaj por la liberigo de la laboranta popolo!

Dum nia restado en Vanglujuan de Ĉangŝa, Prezidanto Maŭ ofte eliris kaj kelkfoje forestadis por pluraj tagoj. Mi sciiĝis nur poste, ke li forestis por fari esploradon pri kamparana movado.

Dum nia loĝado ĉe n-ro 41 de Dufuti en Vuĉang, Prezidanto Maŭ lekciadis en la Instituto de Kamparana Movado kaj ankaŭ verkadis. Li estis tre okupata kaj devis daŭrigi sian laboron ankaŭ hejme. Kajhuj ofte ordigis kaj kopiis materialon por Prezidanto Maŭ kaj ili kune laboradis ĝis tre malfrua horo.

Kiam Prezidanto Maŭ kaj aliaj revoluciaj kamaradoj kunvenis aŭ laboris en lamplumo, mi

silente sidis apude por aŭskulti iliajn parolojn flikante vestojn de la infanoj. Kelkiam mi iris al la strato por aĉeti manĝaĵon por ili, kaj ĉiufoje Prezidanto Maŭ donis porcion ankaŭ al mi. Kiam profundis nokto, Prezidanto Maŭ urĝigis min dormi, sed ili mem enlitiĝis tre malfrue en ĉiu nokto.

Post kiam Prezidanto Maŭ iris al Ginggangmontaro, mi kaj la familio de Kamaradino Kajhuj loĝis en Bancang de Ĉangŝa. En 1930, sub la gvido de Prezidanto Maŭ la Ruĝa Armeo gajnis multajn batalojn kaj senĉese kreskis ankaŭ la revoluciaj fortoj sub la gvido de Kamaradino Kajhuj en Bancang-distrikto. La kuomintanga reakciularo terurigiĝis kaj klopodis ĉiamaniere por subfosi la revolucion. La malamikoj ĉie arestis kaj buĉis revoluciulojn, kaj publikigis reakciajn anoncojn deklarantajn, ke "premion ricevos ĉe tiuj kiuj sukcesos kapti, se ne Maŭ Zedong mem, lian edzinon". Frumatene de la 14-a de oktobro en 1930 pli ol 60 banditoj de Kuomintang ĉirkaŭis nian domon en Bancang kaj arestis Jang Kajhuj, Anjing (la plejaĝa filo de Prezidanto Maŭ) kaj mi. Dum unu monato en malliberejo, kuomintangaj ekzekutistoj turmentadis Kamara-

*Kamaradino Ĉen Jujing rakontas pri
Jang Kajhuj al ruĝgvardianoj.*



dinon Kajhuj kaj per kruelaj batoj kaj per mielaj vortoj. Kajhuj ĉiam restis nefleksebla malgraŭ torturado, kaj fine martiriĝis heroe. Post la morto de Kajhuj, la malamikoj plue torturis min kaj intencis pereigi Anjing. Fine mi kaj Anjing estis elsavitaj dank' al klopodado de revoluciaj kamaradoj. Post pli ol tri monatoj, la malamikoj denove intencis aresti min, kaj niaj kamaradoj sciigis min tuj forfuĝi. Iutage en februaro de 1931 mi forlasis ĉagrene Bancang kie Kamaradino Kajhuj vivis kaj batalis multajn jarojn, kaj revenis al mia hejmloko Ninghiang.

Post la fondo de la nova Ĉinio, en aprilo de 1950, Anjing venis al Ĉangŝa. Kiam ni intervidiĝis, ni pleniĝis de ĝojo kaj ĉagreno pro rememoro pri la pasintaĵoj. Li alportis al mi koran zorgon de Prezidanto Maŭ. Mi larmadis pro emocio kaj danko al Prezidanto Maŭ, kiu tage kaj nokte klopodadis por la liberigo de la tutlanda popolo, tamen ankoraŭ pensadis pri la vartistino kunvivinta antaŭ dekoj da jaroj. Prezidanto Maŭ vere estas granda savanto de ni laborantaj popolanoj!

Poste, Prezidanto Maŭ plurfoje skribis al mi kaj mia filino kaj mi ricevis profundan edukon kaj grandan kuraĝigon de li. Li plurfoje venigis min al Pekino kaj kvarfoje akceptis min en Ĝongnanhaj. En junio de 1957, mi revidis lin unuafoje. Mi neniam forgesos tion. Prezidanto Maŭ aspektanta brile sana ridetante stariĝis kaj kore manpremis kun mi. Li ekparolis: "30 jaroj jam forpasis, kaj vi ankoraŭ restas kiel antaŭe, kaj kiel sana vi estas!" Mi rigardadis lian vizaĝon plenan de bonkoreco kaj forte emociiĝis. Li interparolis kun mi pli ol 2 horojn. La pasintaĵojn antaŭ dekoj da jaroj li memoris tre klare. Li parolis pri la travivaĵoj de nia unuafoja intervidiĝo en Vanglujuan de Ĉangŝa ĝis kiam li eskortis nin de Vuhan al Bancang, kaj li demandis min pri la arestiĝo de Kajhuj kaj Anjing kaj pri mia vivo antaŭ kaj post la Liberiĝo. Mi diris al li, ke Kamaradino Kajhuj estis fidela al la Partio kaj ŝi ĉiam restis nefleksebla antaŭ la torturado kaj allogo de malamikoj, kaj mi parolis pri ŝia heroa martiriĝo. Kiam mi parolis pri ŝia sincera amo al Prezidanto Maŭ kaj ŝia espero pri Anjing, Prezidanto Maŭ eklarmis pro ĉagreno kaj li diris kore: "Kajhuj estis bona homo!

Anjing estis bona infano!" Li rememoris pri aliaj revoluciaj martiroj. Li diris: "La venko de la revolucio ja estas malfacile akirita! Mia familio sola oferis jam ses membrojn." Kaj li aldonis: "Vi dividis dolĉon kaj maldolĉon kun Kajhuj. Vidi vin hodiaŭ estas por mi kvazaŭ vidi Kajhuj. De nun vi povos veni al Pekino unufoje en ĉiu jaro por vidi la progreson de la konstruado." Prezidanto Maŭ petis min tagmanĝi ĉe li kaj diris al mi ke mi bone ripozu kaj zorgu pri mia sano. Kiel feliĉa mi estis, ke mi, ordinara laboranta virino almozinta kaj labirinta kiel servistino en la malnova socio, povis ricevi tian prizorgon de Prezidanto Maŭ. Post 4 tagoj Prezidanto Maŭ refoje akceptis min. Je la disiĝo li donacis al mi kaj mia filino po unu sian foton subskribitan, kaj skribis sian nomon en mia notlibro.

Antaŭ la Printempa Festo de 1958, Prezidanto Maŭ venigis mian filinon al Pekino por pasigi la feston. Tenante mian filinon je la mano, li prezentis ŝin al ĉeestantaj kamaradoj: "Jen filino de la maljuna sinjorino Ĉen, kiu venis antaŭe. Tre multe suferis la knabino." Rimarkinte ke ŝi vestiĝis tre maldike, Prezidanto Maŭ tuj diris al sekretario, ke li aĉetu kompletan da vestoj por ŝi. Multe suferinte kiel almozulino en la pasinteco, nun ŝi ricevis vestojn de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ. La favoro de Prezidanto Maŭ al ni vere superis tiun de la gepatroj!

Unu jaron poste, kiam mia filino studis en la Arta Instituto de Vuhan, ŝi refoje vidis Prezidanton Maŭ. Li pridemandis pri mi kaj pri ŝia lernado. Li diris al ŝi, ke ŝi studu diligente por bone labori en la estonteco kaj tutkore servi al la popolo. En 1960, Prezidanto Maŭ diris al la Kancelario de la Centra Komitato de KPC, ke ĝi sendu al mia filino la kvaran volumon de la «Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong» ĵus eldonitan.

Post la forpaso de Prezidanto Maŭ, mi ĉiam sopiradas lin. Rememorante la tagojn pasigitajn ĉe Prezidanto Maŭ kaj Kamaradino Kajhuj kaj la feliĉajn intervidojn kun Prezidanto Maŭ post la Liberiĝo kaj pensante pri liaj grandaj revoluciaj faroj, mi longe ne povas kvietigi mian emocian koron.

LONG LIN:

Vizito al la Komunumo de Ĉina-Rumana Amikeco

EN Pekino septembro estas monato, dum kiu la ĉielo estas sennuba kaj la vetero bela. Ĝuste en tiu tempo mi faris viziton al la Popola Komunumo de Ĉina-Rumana Amikeco ĉe Lugoŭkiaŭ en la antaŭurbo de Pekino.

La nomita komunumo, kiu estas simbolo de amikeco inter la ĉina kaj rumana popoloj, ricevis sian nomon okaze de la celebrado de la 20-a datreveno de la liberiĝo de Rumanio je la 23-a de aŭgusto de 1964. Kun tereno de 52 kvadrataj kilometroj kaj 48,000 loĝantoj, ĝi produktas ĉefe legomojn, krome ankaŭ fruktojn kaj pekinajn anasojn.

Lugoŭkiaŭ estas fame konata tra la tuta Ĉinio. En tiu loko sin trovas la antikva ŝtona ponto Lugoŭkiaŭ, sur kiu estas skulptitaj multaj ŝtonaj leonoj ĝis nun bone konservataj. En la 7-a de julio de 1937, japanaj imperiismaj trupoj en la norda Ĉinio tie provokis kolizion kaj komencis plenumpleksan agresan militon kontraŭ Ĉinio.

Estas aparte memorinda por la Lugoŭkiaŭ-aj popolanoj la fakto, ke Prezidanto Maŭ Zedong ĝin inspektis en 1958, donante grandan kuraĝigon al la tieaj popolamasoj sur la vojo de agrikultura kolektivigo.



Prezidanto Maŭ akceptas popolamason.

La lokoj inspektitaj de Prezidanto Maŭ

Kiam mi venis al la komunumo, la komunumanoj ĝuste faris rememorigan aktivadon okaze de la unua datreveno de la forpaso de Prezidanto Maŭ. Posttagmeze de la 8-a de septembro la Komunumo okazigis solenan kunvenon, en kiu la kadroj kaj komunumanoj, kiuj havis feliĉon vidi Prezidanton Maŭ siatempe, parolis pri siaj rememoroj pri la inspektado de Prezidanto Maŭ.

Estis vespero de la 13-a de aŭgusto de 1958, kiam Prezidanto Maŭ venis ĉi tien post inspektado de la provincoj Hebej, Henan, Ŝandong kaj la urbo Tiangin. Li inspektis du agrikulturajn produktajn kooperativojn en proksimeco de la ponto, nome la Agrikultura Produkta Kooperativo "Ruĝa Oktobro" de Juegeĝuang kaj la Agrikultura Produkta Kooperativo de Hiaŭtun.

En la kooperativo "Ruĝa Oktobro" Prezidanto Maŭ detale demandis pri la produktaj kvantoj kaj specoj de legomoj, pri provizado de sterko kaj alprenataj rimedoj por pliigi la produkton. Antaŭ kulturejo de tomato, Prezidanto Maŭ demandis: "Ĉu pekinanoj ŝatas tiun specon de tomato?" Kiam la kamaradoj faris jesan respondon, Prezidanto Maŭ diris: "Bone, konservu do tiun specon!" Poste, li venis al eksperimenta kampo de brasiko de la junula produkta taĉmento kaj intime premis la kotplenan manon al la taĉmentestro Tian Deŝun, kiu ĝuste laboris surkampe. "Ĉu maljunaj kamparanoj ne partoprenas en via junula taĉmento?" demandis Prezidanto Maŭ. "Nia taĉmento konsistas el 50 gejunuloj kaj krome du veteranaj terkulturistoj kiel teknikaj direktantoj," respondis Tian Deŝun. "Do via taĉmento konsistas ĉefe el


junuloj!" aprobe diris Prezidanto Maŭ. Poste, li pririgardis kreskostaton de la brasikoj.

Prezidanto Maŭ tre zorgis pri la vivo de la komunumanoj. Li iris en la domon de iu komunumano. Dum interparolo li zorgeme demandis, ĉu la terlitoj de la komunumanoj estas hejtitaj aŭ ne. "Ili dormas vintre sur hejtitaj terlitoj," respondis akompanantaj kadroj. "Dormado en vintro sur varma terlito estas bona por maljunuloj," kontente diris Prezidanto Maŭ. Post tio li inspektis komunan manĝejon de komunumanoj kaj varme interparolis kun la kuiristoj. Li demandis: Je kioma horo oni manĝas kaj kiajn manĝaĵojn oni prenas? Li formovis la vaporumilan kovrilon por pririgardi la mantoŭojn (vaporumitajn panojn), priflaris la kukurban supon en kuvo kaj diris: "Vere apetitiveka." Poste li demandis, "ĉu la komunumanoj estas kontentaj pri la manĝaĵo?" "Jes," kuiristo respondis. "Pri la varma manĝaĵo certe neniu plendos!" Tuj vigliĝis kun ridoj la manĝejo.


Preskaŭ subiris la suno, kiam Prezidanto Maŭ descendis de aŭtomobilo ĉe la kooperativo de Hiaŭtun. Kune kun vilaĝaj kadroj li venis al eksperimenta kampo de maizo kaj tie aŭskultis raporton de produkta grupestro pri kultura metodo kaj produktaj kvantoj de maizo kaj tritiko. Kun aparta zorgemo li demandis kiom da reformitaj agrikulturiloj la kooperativo disponas kaj ĉu oni ankoraŭ vektportas dum rikoltado.

Jam falis nokta vualo, sed Prezidanto Maŭ interesplene vizitis la komunumanojn, kiuj profunde plugis la grundon, kaj detale demandis pri iliaj laboroj. Li laŭte diris al la ĉirkaŭantaj komunumanoj: "Jam noktigas. Ĉu ne jam estas tempo por hejmeniro?"

La ensemblo Muresul vizitas kamparon



Ebenigo de kampoj



Ĉe lia foriro, la komunumanoj ankoraŭ ameme ĉirkaŭis lin. Li manpremis kaj salutis al ili kaj poste forveturis per aŭtomobilo.

La informo pri la inspektado de Prezidanto Maŭ flugis kiel zefiro tra la najbaraj vilaĝoj kaj multe instigis la socialisman entuziasmon de la komunumanoj. Post 16 tagoj, kvin altklasaj agrikulturaj kooperativoj de Juegeĝuang, Hiaŭ-tun kaj aliaj kuniĝis en la Popolan Komunumon Lugoŭkiaŭ. Dank' al tio la forto de kolektivo fariĝis pli granda.

Jam forpasis 19 jaroj. Rememorante pri ĉio ĉi tio, la komunumanoj ĉiam diris, ke la afabla sinteno kaj kora instruado de Prezidanto Maŭ estas ankoraŭ firme tenataj en ilia memoro.

Bazo de legomoj por la ĉefurbo

La Komunumo de Ĉina-Rumana Amikeco estas unu el la legomaj bazoj de Pekino. En 1957 ĝi produktis 50,000 tunojn da legomoj. Nun ĝi ĉiujare produktas 140,000 tunojn da legomoj kaj krome liveras al la ŝtato pli ol 30,000 grasajn porkojn kaj 220,000 pekinajn anasojn. La subskribinto tie vidis atingojn de tiu komunumo en irigacia konstruado kaj agrikultura mekanikigo, sub la kuraĝigo de la inspektado de Prezidanto Maŭ, sinapogante sur la fortoj de la kolektivo.


La nomita komunumo situas apud la rivero Jongding, kiu ofte inundiĝis en la historio. Kiel sekvo formiĝis tie vastaj sablejoj, salalkala grundo, fragmitaj marĉoj kaj senordaj tombejoj. Pro tio la tero de la komunumo estis ofte minacata de sekeco kaj inundoj kaj la produktaj kvantoj de legomoj kaj greno estis tre malaltaj. Post fondiĝo de la komunumo, oni komencis laŭplanan reformadon de la grundoj. En Dongguantoŭ-

brigado de la komunumo oni rakontis al mi ĝian ŝanĝiĝon: Ĝia tereno estas malalta. En la pasinteco ĝiaj salalkalaj kampoj kaj fragmitaj marĉoj okupis preskaŭ du trionojn de ĝia tuta tero kaj la mua (1 muo = 1/15 hektaro) produkto-kvanto de greno estis nur ĉ. 25 kg. Post la Liberiĝo la komunumanoj faris grandan penadon por reformi tian sterilan teron. En 1958, 2,000 komunumanoj tagnokte ebenigis la teron, boris putojn kaj fosis kanalojn. Post klopodo de pluraj jaroj ili fine reformis la salalkalan teron en irigacieblajn kampojn. En 1964 ili reformis fragmitajn marĉojn de pli ol 800 muoj en fekundajn kampojn.

Tia ŝanĝiĝo okazis ankaŭ al la tuta komunumo. La malebenaj salalkala tero, marĉoj kaj senordaj tombejoj jam reformiĝis en kvadratajn kampojn ĉirkaŭitajn de arbazonoj. En la movado de lerno de Daĝaj oni instalas 170 km. da malalt-tensia elektrofadeno kaj per tio provizas la tutan komunumon per elektro por produktado kaj ĉiutaga vivo de la amaso. Samtempe kun tio oni fosis ĉ. 50 km. da drenaj kaj irigaciaj kanaloj kaj pli ol 500 profundajn putojn, tiel ke la rikolto de pli ol 30,000 muoj da kampoj estas garantiitaj kontraŭ sekeco kaj inundiĝo. Nun la mua produktokvanto de legomoj de pli ol 130 specoj de la tuta komunumo superis 5,000 kg. Ankaŭ tiu de greno superis 500 kg.

Mi vizitis ankaŭ fruktoĝardenojn kun amplekso de mil muoj. Vidante pomarbojn plenajn de fruktoj, oni ja ne povas kredi, ke tiu loko antaŭe estis sablejo, kaj ke oni tie prenis sablon kaj gruzojn. En 1962 la komunumo investis pli ol milionon da juanoj kaj kolektis tien laborfortojn por reformi ĝin en fruktoĝardenon. Oni plenigis tie profundajn kavegojn kaj alportis

Liverado de legomoj al la urbo



teron de malproksimaj lokoj. Poste ili faris ripetadan eksperimentadon por kreskigo kaj vivo de fruktarbidoj. Nun tiu brigado povas ĉiujare liveri al la ŝtato pli ol 5,000 tunojn da fruktoj.

La kooperativo "Ruĝa Oktobro" inspektita de Prezidanto Maŭ estas nun Juegeĝuang-brigado de tiu komunumo. De multaj jaroj tiu brigado aĉetis per mem akiritaj monrimedoj grandajn nombrojn da agrikulturaj maŝinoj kaj jam fundamente mekanizis plugadon, drenadon, irigacion, degrajngigon, plantan protektadon, transportadon kaj prilaboradon de greno kaj furaĝo, liberigante multe da laborfortoj por uzi ilin en kulturado de legomoj kaj en detala flegado de kampoj. La brigado enkondukis kaj kulturis multajn novajn specojn de legomoj. Oni senĉese pliiĝis forcejojn kaj plastmembranajn ŝirmilojn por produkti legomojn, konstruis kelojn por konservi freŝajn legomojn kaj provizi per tiuj la merkaton kontinue. Tian Deŝun, kiu siatempe vidis Prezidanton Maŭ kaj nun estas estro de Juegeĝuang-brigado, diris al mi ke sen agrikultura mekanizo estas ne eble por ili fari ĉion ĉi tion.

Ĉiam pliiĝis ankaŭ la agrikulturaj maŝinoj de la komunumo. Ĉe sia fondiĝo ĝi havis nek aŭton nek traktoron. Nun la tuta komunumo posedas sume 168 aŭtojn, 40 grandajn traktorojn kaj 162 mantraktoretojn. Ĝi fondis ankaŭ fabrikojn de elektraĵoj kaj agrikulturaj maŝinoj, riparejon de aŭtoj kaj traktoroj k.t.p. sume 11 fabrikojn. Krome, ĝiaj 21 brigadoj ĉiuj starigis propran fabrikon por ripari agrikulturilojn kaj prilabori agrikulturajn kaj flank-okupajn produktaĵojn.

Profunda amikeco inter la ĉina kaj rumana popoloj

Inter la komunumanoj cirkulas multaj rakontoj pri amikeco inter la ĉina kaj rumana popoloj. En la amikeca ĉambro de la komunumo ni vidis multajn objektojn donacitajn de rumanaj amikoj, inter kiuj estas diversaj rumanaj naciaj kostumoj, tablotukoj, littukoj, bambukorboj, latunaj kruĉoj kaj manĝilaroj. De 1964 gastis

tie plejparto de la rumanaj delegacioj, kiuj vizitis Ĉinion. La komunumanoj havas fratajn rilatojn kun la membroj de la Kooperativo de Rumana-Ĉina Amikeco kiu troviĝas en la orienta antaŭurbo de Bukareŝto, la ĉefurbo de Rumanio. Ili reciproke sendis siajn delegaciojn unuj al la aliaj por fari amikan viziton kaj plurfoje interŝanĝis semojn de maizo, sorgo, sunfloro kaj legomoj. Tiuj semoj simbolantaj amikecon jam kreskas, floras kaj fruktodonas sur la tero de ambaŭ landoj.

Ĉiujare dum antaŭvespero de la nacia festo de Rumanio, kamaradoj de la rumana ambasado en Ĉinio venas al la komunumo por kune aranĝi amikecan amuzvesperon kaj celebri la brilan feston de la rumana popolo. Okaze de la unuamaja internacia laborfestoj ili ofte venas al la komunumo por partopreni fizikan laboron.

En la lasta junio la Rumana Popola Ensemblo Muresul vizitis la komunumon. Ĝi alportis ne nur kolorriĉajn popolajn dancojn kaj kantojn de Rumanio, sed ankaŭ intiman saluton de la rumana popolo. La komunumanoj varme akceptis la ensemblon kiel siajn parencojn. En la amuza kunveno ili kantis la rumanajn kantojn "la Aminda Bukareŝto" kaj "Labortaĉmentanoj" kaj per tio esprimis sian profundan amikecon al la rumana popolo.

En aprilo de la kuranta jaro, ankaŭ la Pekina Agrikultura Amika Delegacio faris amikan viziton al Rumanio. La vicedestro de la delegacio estis Jang Ĝonghing, sekretario de la partia komitato de tiu komunumo. Li rakontis al mi la varman akceptadon kaj gastamon, kiujn la delegacio ricevis ĉe la rumana popolo. Li diris: "La ĉina kaj rumana popoloj estas intimaj fratoj. Profunda amikeco formiĝis inter ni en reciprokaj subteno, kuraĝigo kaj interhelpo. Neniu povas ĝin subfosi." Li esprimis, ke li nepre dediĉos sian forton por kontribui en plifortigo de la solidareco kaj kunlaboro inter la ĉina kaj rumana popoloj, kaj petis ke ni transdonu pere de la gazeto "El Popola Ĉinio", la sinceran saluton de la membroj de la Komunumo de Ĉina-Rumana Amikeco al la rumana popolo kaj la membroj de la Kooperativo de Rumana-Ĉina Amikeco.

La fama Lugoŭkiaŭ


LUGOŬKIAŬ situas en la Popola Komunumo de Ĉina-Rumana Amikeco je pli ol dek kilometroj fore de Pekino en ĝia sudokcidenta antaŭurbo. Ĝi estas la plej granda antikva ŝtona ponto en norda Ĉinio. Tiu 11-spana ponto kun longeco de 266.5 metroj konstruiĝis antaŭ pli ol 780 jaroj. En antikveco ĝi estis pasejo de "naŭ-provincaj imperiestraj vojoj" kaj eĉ nun ĝi ankoraŭ estas unu el la gravaj pasejoj inter la suda kaj norda partoj de norda Ĉinio.

Tiu ponto estas fame konata pro siaj majesteco, firmeco kaj eminenta konstrua arto. Kvankam ĝi jam trapasis preskaŭ 800 vintrojn kaj somerojn kaj estis atakita de torenta inundakvo kaj veterdetruo, tamen ĝi ankoraŭ estas sufiĉe fortika kaj povas elporti premon de pli ol 400 tunoj. Aparte allogaj estas la leonoj grandaj kaj malgrandaj en diversaj pozoj ĉizitaj sur ŝtona balustrado. Iuj el ili rigardas la ĉielon kun levita kapo, aliaj fiksrigardas la plankon de la ponto, triaj sidas kaj rigardas unu la alian, kaj kvaraj starigas orelojn kvazaŭ ili atente aŭskultus la murmuradon de la fluo. Aparte komikaj estas la malgrandaj leonoj, el kiuj iuj kuŝas sur la dorso aŭ kapo de grandaj leonoj, aliaj sin kaŝas en la sino de leoninoj, triaj ludas sonorilon je la kolo de granda leono kaj kvaraj sin kaŝas tiel, ke nur duona kapo aŭ ilia buŝo estas videblaj. Malfacile kalkuleblaj estas tiuj ŝtonaj leonoj kaj cirkulis en la ĉirkaŭaĵo de Pekino popola diro: Nekalkuleblaj kiel la leonoj sur Lugoŭkiaŭ. La ŝtonaj gravuraĵoj plene montris la grandan saĝon kaj artan kreivon de la la-

boranta popolo de la antikva Ĉinio.

Sed pro longtempa veterdetruigo, la surfaco de la ŝtonajoj erodiĝis. Post la Liberiĝo, la Popola Registaro prenis Lugoŭkiaŭ kiel unu el la gravaj protektendaj historiaj restaĵoj de la tuta lando, plurfoje riparigis ĝin, organizis specialistojn por studi pri la arkitekturo de la ponto kaj nombrigis la ŝtonajn leonojn. Oni konstatis, ke sur la ponto estas entute 485 grandaj kaj malgrandaj ŝtonaj leonoj.


En la Granda Proleta Kultura Revolucio, koncernaj branĉoj de Pekino venigis dekojn da lertaj ŝtonajistoj el diversaj lokoj de la tuta Ĉinio por renovigi la gravuraĵojn kaj dank' al ilia laboro la antikva ponto alprenis novan aspekton.



Lugoŭ-ponto kaj la memor-ŝtono ĉe la ponto

Je la fino de la 13-a jarcento, la fama itala vojaĝisto Marko Polo venis al Lugoŭkiaŭ, kaj dank' al lia prezentado tiu ponto diskoniĝis ankaŭ inter eŭropanoj. Sed ĝi fariĝis vere mondfama nur en la lastaj jardekoj, precipe post la Incidento de Lugoŭkiaŭ je la 7-a de Julio antaŭ 40 jaroj, kiam la japanaj imperiistoj komencis plenarypleksan invadon al Ĉinio kaj la tuta ĉina popolo ekfaris la okjaran reziston sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio.

Nun sude de tiu ponto servas ferbetona duoblearka ponto sepspana kun longeco de 550 metroj. Tiu ponto estas konstruita en 1970 laŭ la bezono de la socialisma konstruado. Tra tiu ponto iras alia grava ŝoseo de la ĉefurbo.





Jang Kajhuj ridetanta inter umefloroj

Danco

dediĉita

al martiro

de PANG ĜIJANG¹

“Mi perdis fierindan Jang², vi vian Liu³,
Leviĝis ili rekte al ĉiel’.

Nu, kion Vu Gang⁴ havas por regali l’ gastojn?

Jen vinon de osmanto dolĉa li prezentas.

Svingante la manikojn larĝajn, la soleca
Ĉang-e⁵,

Ekdancas en la spaco por animoj la fidelaj.

Raport’ subita: tigro subigitas⁶ en la mondo,

De ĝoj’, ŝprucantaj larmoj tuj turniĝas en
pluvegon.

Tio estas poemo «Responde al Li Ŝuji⁷ — laŭ melodio Djeljanhua», skribita de Prezidanto Maŭ en la 11-a de majo, 1957.

Por esprimi profundan sopiron kaj estimon de la ĉina popolo al martiro Jang Kajhuj, edzino de Prezidanto Maŭ, ni kreis la baletan «Djeljanhua».

Post leviĝo de la kurteno prezentiĝas antaŭ la spektatoroj sennombraj umearboj kun florplenaj branĉoj en hela sunbrilo sub la lazura firmamento inter kiuj feinoj ekdancas gracie kaj Jang Kajhuj majeste staras.

La ĉefa intrigo de la baletto estas jena: Post la kontraŭrevolucia puĉo fare de Ĉiang Kajšek je la 12-a de aprilo, 1927, Ĉen Duhiu, ĉefo de dekstra oportunisma linio en la Kompartio ordonis senarmigi la laboristajn kaj kamparanajn trupojn konforme al la bezono de la kuomintanga reakciularo. Laŭ la instrukcio de Kamarado Maŭ Zedong ke "el pafilo venas ŝtatpotenco", Jang Kajhuj organizis armadon de kamparanoj en la ĉirkaŭaĵo de Ĉangŝa de Hunan-provineco por ke tiuj partoprenu en la Aŭtunrikolta Ribelo. Ili faris glavojn kaj lancojn kaj sin ekzercis en montoj. Ŝi propagandis revolucion veron kaj mobilizis la amasojn al arma batalo kontraŭ malamikoj. Iun nokton, kiam la malamikoj iris en montregionon por sieĝi tieajn kompartianojn, la memdefendaj trupoj de kamparanoj surprizis la sidejon de iu malamika regimento kaj predis multajn armilojn.

En 1930, laŭ instrukcio de Prezidanto Maŭ, la memdefendaj trupoj oficiale reorganiziĝis en la Ruĝan Armeon. Kiam ili estis marŝantaj al Ginggaŝ-montaro por kuniĝi kun tieaj trupoj de la Ruĝa Armeo, malamika trupo sieĝis la montojn. Jang Kajhuj kaj aliaj kuraĝe baris la malamikojn tiel ke la memdefendaj trupoj sekure translokiĝis. Poste ŝi kaj ŝia ok-jara filo Maŭ Anjing revenis hejmen, kaj malfeliĉe estis arestitaj.

En malliberejo ili estis kruele turmentitaj, sed ili neniam fleksiĝis. En feroĉa torturado de la malamiko, ŝi konsideris nur venkon de la revolucio, sed ne sian personan sekurecon. Kiam la malamikoj decidis mortigi ŝin, ŝi aplombe forviŝis al ŝia filo larmojn sur liaj vangoj, adiaŭis la

kamaradojn en la malliberejo, brave marŝis al la ekzekutejo. Ŝia morto manifestis la noblan fidelecon de komunisto al la Kompartio kaj sian heroan sindonemon por la komunisma afero.

Dum verkado, ni aplikis la kreaĵmetodon de kombino de revolucia realismo kun revolucia romantikismo. Ni priskribis ne nur la revolucionan batalon de Jang Kajhuj, sed ankaŭ leviĝon de la fidelaj animoj de la martiroj al la ĉielo kaj la bonvenigon de Ĉang-e kaj aliaj feinoj al ili. Vu Gang respektoplene prezentis al ili vinon kaj Ĉang-e ekdancis por ili. La animo de la heroino zorgas pri la batalo en la mondo, kaj en ŝiaj okuloj la vastaj manikoj de Ĉang-e flirtas kiel ruĝaj flagoj. Kiam la ĝojiga novaĵo pri la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko en 1949 venis al la luno, ĝi tuj ekbolis de ĝojo, la blanka

Jang Kajhuj sendas Anjing al Ginggaŝ-montaro.



kuniklo ĝoje saltadis, kaj feinoj ekdancis. Subite koloraj balonoj portantaj rubandon kun surskribajo "Vivu la granda gvidanto Prezidanto Maŭ" leviĝis de la homa mondo al la ĉielo. La animo de Jang Kajhuj kaptis la rubandon, malsuprenrigardis al la homaro kaj tiel ĝojiĝis pro la venko akirita de la ĉina popolo sub la gvido de la Kompartio kaj Prezidanto Maŭ, ke ŝiaj larmoj falas kvazaŭ pluvego.

Dum projektado de la dancoj, ni adoptis popolan dancon de Hunan, ĉinan klasikan dancon kaj adoptis melodion de popola kanto kiel la ĉefmelodion en la tuta baletto. Tio ludis aktivan rolon en modlado de karakteroj kaj prezento de la intrigo de la baletto.

La baletto estis verkita en 1959. Ni trifoje venis al la loko kie kamaradino Jang Kajhuj bataladis, vizitis ŝian patrinon, ŝian pliaĝan fraton Jang Kajĝi kaj ties edzinon Li Congde, ŝian bonan amikinson Li Ŝuji, edzinon de martiro Liu Ĝihjun kaj la vartistinon Ĉen Jujing, kiu

Jang Kajhuj batalas kontraŭ la malamikoj.




vivis kun ŝi kvar jarojn kaj estis arestita kune kun ŝi. Ili entuziasme rakontis al ni ŝiajn vivon, temperamenton, interesojn, kutimojn, ŝatojn k.a. Li Ŝuji donacis al ni foton de Jang Kajhuj kaj kuraĝigis nin bone verki la baletton. Ni ankaŭ vizitis pionirojn de la kulturaj kaj artaj rondoj de Ĉinio, kaj la fama poeto Guo Mojuo skribis al ni leteron por helpi nin ĝuste kompreni la grandan signifon de la poemo de Prezidanto Maŭ.

En 1962, Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj aŭdiencis gvidanton de nia ensemblo kaj la aktorinon ludantan Jang Kajhuj kaj varme kuraĝigis nin poluri la baletton.

En oktobro de 1959, Prezidanto Maŭ rigardis kelkajn scenojn de la baletto. Antaŭ la prezentado Prezidanto Maŭ zorge demandis al kamarado apud li ĉu la planko tiel glata ne glitfaligos aktorojn. Kiam Ĉang-e aperis sur la scenejo kun longaj rubandoj flirtantaj en la aero, Prezidanto Maŭ manklakadis kun rideto. Post

La fidela animo de la martiro leviĝas supren en la ĉielon.




prezentado Prezidanto Maŭ laŭdis Li Jin, kiu ludis Ĉang-e, ke ŝi dancis bone. La lasta diris: "Ne bone. Bonvolu fari kritikon, Prezidanto." Prezidanto Maŭ diris: "Vi dancis tre bone!" Li Jin diris en emociiĝo: "Prezidanto, ĉiuj gekamaradoj de nia ensemblo petis min transdoni iliajn salutojn al vi. Bonan sanon al vi, Prezidanto!" Prezidanto Maŭ diris karese: "Dankon al vi ĉiuj!" Premante manon de Prezidanto Maŭ aktorino Ĉeng Gujĝen nenion povis diri kaj eklarmis pro emociiĝo. Prezidanto Maŭ demandis pri ŝia nomo kaj poste demandis ankaŭ pri ŝia hejmloko kaj ŝiaj gefratoj. Malgranda Ĉeng diris al Prezidanto Maŭ: "Mia hejmloko estas Dandong. Ni vivis tre mizere en la malnova socio, mia plej juna fratino mortis de malsato. Nun la vivo estas tre feliĉa. Nia tuta familio dankas Prezidanton Maŭ. Nia plej aĝa frato aliĝis al la Liberiga Armeo kaj martiriĝis en la Liberiga Milito en la Nordoriento." Aŭdinte tion, Prezidanto Maŭ diris frapetante ŝian ŝultron al malgranda Ĉeng: "La martiroj estas tre gloraj!"

Renegatino Giang King tre malamis la baleton. Kiam ni prezentis la baleton al la popolo, ŝi sarkasme diris: "El malgranda poemo vi eĉ povis fari grandan baleton, vere bravaj estas vi!" "Bedaŭrinde," ŝi aldonis, "mi ne havas tempon por rigardi ĝin!" Ŝiaj vortoj montris ŝian turpan koron ke ŝi intencis subtaksi la grandan signifon de la poemo de Prezidanto Maŭ kaj makuli la heroan martiron Jang Kajhuj.

Post la faligo de la "kvarpersona bando", organiziĝis grupo el pli ol 40 personoj inkluzive de koregrafoj, reĝisoroj kaj aktoroj. Ili venis al la hejmloko de Jang Kajhuj por informiĝi kaj lerni pri ŝia revolucia praktiko. Ili refoje reviziis la baleton kaj elstarigis la grandan penson de Prezidanto Maŭ "**el pafiloj venas ŝtatpotenco**" kaj la batalon de la du linioj interne de la Partio. Pro tio la konflikto de la intrigo de la baleto pliintensiĝis, la ideologia enhavo pliriĉiĝis, la signifo de la poemo estas pli bone elvolvita kaj la figuro de martiro Jang Kajhuj fariĝis pli brila.

La animo de la martiro ĝojas pro la venko en la homa mondo.



Al la Legantoj

Karaj legantoj,

Salutojn al vi okaze de la alveno de la nova jaro!

Ni sincere vin dankas pro via subteno al El Popola Ĉinio per via abono en la pasinta jaro. Je la komenco de la nova jaro ni esperas, ke vi renovigos vian abonon kaj ankaŭ abonigos viajn amikojn kaj konatojn. Jen kelkaj atentigoj pri nia abonvarbado por 1978:

1. La varbado finiĝos je la 28-a de feb. 1978. Ĉiu abonanto ricevos grandan kalendaron de 1978 kun koloraj ĉinstilaj pentraĵoj;

2. Ni esperas, ke niaj malnovaj abonantoj, la amikoj de El Popola Ĉinio varbos por nia gazeto novajn abonantojn, kaj al ĉiu amiko de E.P.Ĉ ni donacos laŭ la nombro de iliaj varbitoj diversajn memorarojn ĉinstilajn;

3. Sendu la nomojn kaj adresojn de la varbitoj kaj la abonkotizojn al niaj perantoj en via loko aŭ rekte al la Esperanta Sekcio de Guozi Shudian, P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio.

4. Abontarifo: Por 1 jaro	£0.90	US\$ 2.20
Por 2 jaroj	£1.35	US\$ 3.30
Por 3 jaroj	£1.80	US\$ 4.40

Ĉikune ni sendas al vi abonvarbilon por via uzo.

Feliĉan Novjaron!

Esperanta Sekcio de Guozi Shudian de Ĉinio

Klarigoj:

1 La verkinto de la artikolo estas unu el la koregrafoj de la baletoj.

2 "Jang" aludas martiron Jang Kajhuj (1901—1930), edzino de Prezidanto Maŭ. En 1921 ŝi aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio. En 1923, sekvante Prezidanton Maŭ, ŝi okupiĝis pri laborista, kamparana kaj virina movadoj en Sanhajo, Guangĝoŭ kaj Vuhan. En 1925, akompanante Prezidanton Maŭ, ŝi venis al Saŭŝan kaj tie helpis lin en fondo de partia organizo kaj disvolvo de kamparana batalo. En 1927, post la malsukceso de la Granda Revolucio, Prezidanto Maŭ kondukis revoluciajn trupojn al Ginggang-montaro. Laŭ direktivo de Prezidanto Maŭ, kamaradino Jang Kajhuj restis en Ĉangŝa kaj daŭrigis subteran laboron de la Partio kaj organizadon de kamparanoj al arma batalo. En 1930 kuomintangaj reakciuloj arestis kaj murdis ŝin. Kamaradino Jang Kajhuj estis kunlernantino kaj bona amikino de Li Suji.

3 "Liu" aludas martiron Liu Gihjun (1898—1932), edzon de k-dino Li Suji. Li estis multjara kunbatalanto de Prezidanto Maŭ. En 1923 li aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio. Li estis ĉefsekretario de la Hunan-a Kamparana Asocio. En 1927, li partoprenis en la Nanĉang-a Leviĝo de la Unua de Aŭgusto. En 1932, li oferis sian vivon en batalo ĉe Honghu de provinco Hubej.

4 Figuro el ĉina mito, kiu pro iu kulpo estis kondamnita al hakado de osmanta arbo en la luno, kiu estas neniam forhakebla.

5 Diino de la luno en ĉina mito

6 Aludo al faligo de la kuomintanga reakciularo.

7 Kamaradino Li Suji estis instruistino de la ĉina lingvo en la 10-a Mezlernejo de Ĉangŝa de la provinco Hunan. En februaro de 1957, kamaradino Li verkis poemon memore al martiro Liu Gihjun kaj sendis ĝin al Prezidanto Maŭ. Prezidanto Maŭ respondis ŝin per tiu ĉi poemo.

Sekretario de la partia komitato de gubernio

EN julio de 1976, okazis en Tangŝan kaj Fengnan de nia lando tertremo malofita en la historio. La tieaj popolamasoj kaj kadroj montris heroan revolucian obstinecon kaj komunisman sinoferan spiriton en la batalo kontraŭ la katastrofo kaj en rekonstruado de sia hejmloko. Peng Janĝang, la sekretario de la partia komitato de Fengnan-gubernio amata kaj laŭdata de la popolamasoj, estas unu el ili.

I

Subite okazis tertremo kaj domoj disfalis en grandaj areoj. Ankaŭ la domo de Peng Janĝang tuj ruiniĝis. Peng Janĝang estis savita de aliaj el ruinaĵo. Ne zorgante la sekurecon de siaj familianoj kaj siajn vundojn, li suriris straton por direkti savlaboron kune kun vicsekretario Mjaŭ Vanghe.

Eldanĝerigitaj popolanoj iris al li kaj vokis: "Sekretario Peng!"

Kiom granda espero de la Fengnan-a popolo al la Partio estis en tiu elkora voko! Peng Janĝang sciis, ke kiam la amasoj urĝe bezonas gvidon de la Partio, kiel gvida kadro li devas stari firme kaj gvidi la amasojn en batalo kontraŭ malfaciloj. Eksvinginte sian pugnon li diris: "Kamaradoj, povas nin venki nek la tertremo nek la malfaciloj. La partia komitato de Fengnan-gubernio ankoraŭ ekzistas kaj ĝia heroa popolo ankoraŭ vivas, ni devas tuj nin organizi al savado."

Post la tertremo, Prezidanto Maŭ kaj la Centra Komitato de la Partio rapide sendis tien truopojn de ĈPLA kaj kuractaĉmentojn. Krome granda kvanto da helpaj materialoj estis senĉese transportita tien de diversaj lokoj de nia lando. Tio multe kuraĝigis kaj subtenis la plagitajn

popolanojn en batalo kontraŭ la katastrofo. Peng Janĝang tuj kolektis kadrojn kaj organizis amasojn, por ke ili plej rapide distribuu la helpemon kaj materialojn al la suferantoj de la katastrofo. Li persone donis instrukcion al la koncernaj fakoj, ke ili rapide solvu la problemojn de riparado kaj varmigo de domoj kaj prevento de epidemio kaj malsanoj. En somero li jam zorgis, kiel oni povos bone pasigi vintron.

Peng Janĝang diris al kadroj de la partia komitato de la gubernio: "En tiu ĉi momento la popolamasoj plej bezonas zorgadon de la Partio. Ni kadroj de la Partio nepre alportu al ĉiu familio varmon de la Partio."

Peng Janĝang iris al komunumoj kaj brigadoj en la kamparo por vidi plagitajn popolamasojn. Iufoje li venis en la hejmon de maljuna malriĉkamarano Vang Tinghju kaj rimarkis, ke lia nepo portas vatitan veston sen kitelo. En la sekvanta tago, li sendis ŝtofon al lia familio por fari kitelon. Tiel kortuŝiĝis la edzino de Vang, ke ŝi, tenante la ŝtofon en la manoj, ne sciis kion diri.

II

Kiel venki la teruran katastrofon de tertremo? Peng Janĝang helpis la partiajn komitatanojn kaj diversnivelajn kadrojn de la gubernio starigi revolucian spiriton sin apogi sur la propraj fortoj por venki la naturan katastrofon. Sub lia gvido la partia komitato de la gubernio faris urĝan mobilizadon al la kadroj kaj amasoj, ke ili tuj sin ĵetu en la batalon kontraŭ la katastrofo kaj efektive la antaŭe difinitan planon konstrui Fengnan en Daĝaj-tipan gubernion en du jaroj. Tuj post la kunveno la membroj de la partia konstanta komitato de la gubernio iris al



Peng Jangang (la dua de maldekstre) interkonsiliĝas kun kadroj pri laboro.

komunumoj kaj brigadoj kaj laboregis kune kun tieaj komunumanoj por rekonstrui novan socialisman hejmlokon.

En sia laboro Peng Jangang multe atentis pri esplorado kaj enketado. En la printempa plugado de la kuranta jaro, kadroj de iuj komunumoj kaj brigadoj diris, ke ili ne havas sufiĉajn laborfortojn por plenumi la taskon. Aŭdinte tion Peng Jangang venis al Liuhe-brigado por enketadi laborante kune kun komunumanoj. La lastaj diris al li, ke la brigado havas sufiĉe da laborfortoj, sed oni ne metis ĉiujn fortojn en la agrikulturan laboron. 40% de la laborfortoj de la tuta brigado sin okupis pri neagrikulturaj produktoj. La ĉefa kaŭzo kuŝis en la malbona administrado sub la influo de la reviziisma linio de la “kvarpersona bando” de Vang-Gang-Giang-Jaŭ. Tial Peng Jangang forte kritikis, kune kun aliaj kadroj kaj komunumanoj, la krimojn de la “kvarpersona bando”, kaj ili starigis kaj perfektigis la laboradministran regularon. La neagrikulturaj personoj de la brigado rapide reduktiĝis ĝis 13% de la tutaj laborfortoj. Dank’ al tio granda nombro da fortaj laboruloj metiĝis en la printempan plugadon.

Post la tertremo, en la gubernio pli ol 4,700 maŝinputoj ne povis funkcii. Pro tio la popolaj komunumanoj rapide faris pli ol 100 simplajn putoborajn maŝinojn sin apogante sur la propraj fortoj kaj boris multajn novajn maŝinputojn. La totala profundeco de la putoj boritaj en pli ol kvin monatoj egalas al la alteco de 56 Gomo-langma-oj. Je la fino de la lasta marto la totala nombro de la maŝinputoj de la gubernio jam superis tiun antaŭ la tertremo, tiel ke 400,000 muoj da tritikaj kampoj estis ĝustatempe irigaciitaj.

En la fino de 1976, post kiam okazis la Dua Tutlanda Konferenco pri Lerno de Daĝaj en Agrikulturo. Peng Jangang pensis en si: Ĉu oni povas plivastigi la semareon de printempa tritiko por rikolti pli multe da somera greno de 1977? Tiam la vintra tritiko estis irigaciata kaj estis multaj aliaj laboroj, kaj ankaŭ la akvo-utiliga konstruado iris pli intense ol en iu ajn pasinta jaro. Kiel oni racie uzu la laborfortojn en tia situacio, se oni volas semi pli multe da printempa tritiko? Peng Jangang venis al Hiaŭ-bejliuhe-brigado, kiu akumulis sperton en solvo de la problemoj kaj pliigo de la grenaj produkto-kvanto, kaj tie okazigis kunvenon por interŝanĝi

sperton de produktado. Dank' al tio la tuta gubernio plenumis semadon de printempa tritiko sur 80,000 muoj da kampoj, pli frue je 15 tagoj ol en la pasinteco.

III

Peng Jangang partoprenis en revolucio jam pli ol tridek jarojn. Kiel malnova komunisto li ĉiam donis modelan ekzemplon per siaj agoj, partoprenis en kolektiva produkta laboro kaj persistis en daŭrigo de la revolucio sub la diktaturo de la proletaro. Kvankam li havas jam aĝon de 60 jaroj kaj estas malsana, tamen li ebenigis kampojn kune kun komunumanoj en neĝado kaj somere faris rikoltadon sub la bakanta suno. En ĉiu ajn tempo li estas kaj gvidanto kaj ordinara laborulo.

En la sekvanta tago post sia ĉeesto de la Dua Tutlanda Konferenco pri Lerno de Daĝaj en Agrikulturo, Peng Jangang iris al Liuhe-brigado de Fengnan-gubernio por fiziklabori. Matene li ĉiam la unua iris al laboro, kaj aliaj imitis lin kaj konkure prenis pezan laboron sur sin. Iufoje en transportado de sterko, maljuna malriĉkamparano Huang Ŝunking prenis ŝovelilon kaj transdonis alian al Peng Jangang, dirante: "Frato, ni konkursu." "Bone, bone!" diris Peng Jangang, sed li prenis pioĉon anstataŭ la ŝovelilon por fosi malmolajn sterkoblokojn. Vidinte tion, ĉiuj komunumanoj laboris pli entuziasme kaj pli energie.

Post la tertremo, Peng Jangang loĝis en matobudo same kiel la amasoj. Nelonge poste, oni sendis el alia loko kelkajn kanvastendojn al la gubernio, kaj la oficejo de la partia komitato de la gubernio intencis doni ilin al Peng Jangang kaj aliaj kadroj de la komitato. Sed ili akceptis nenion kaj disdonis ilin al aliaj laborantoj. Poste, simplaj loĝdomoj estis konstruitaj unuj post aliaj, kaj kadroj kaj iliaj familianoj translokiĝis en ilin. Sed la familio de Peng Jangang ankoraŭ loĝis en matobudo. Oni admonis lin translokiĝi, sed li diris: "La partia komitato de la gubernio jam decidis, ke la komunumanoj enlokiĝu antaŭ ol la partianoj, la popolamasoj antaŭ ol la kadroj kaj la ordinara kadroj antaŭ ol la gvidantoj. Mi devas bone plenumi la decidon." La vetero fariĝis malvarma kaj iuj kamaradoj atentigis lin, ke ĉiuj kamaradoj de la tuta institucio, escepte de via familio jam translokiĝis en la simplajn loĝdomojn. Nur tiam li translokiĝis en simplan domon.

De multaj jaroj li persiste studas Marksismon-Leninismon-Maŭzedongpensjon kaj partiajn dokumentojn. La 26-an de aprilo de la kuranta jaro, Prezidanto Hua Guofeng aŭdiencis Peng Jangang kaj aliajn reprezentantojn de avangardaj individuoj kaj kolektivoj, kiuj ĉeestis la kunvenon de kontraŭtertremata batalo kaj savlaboro de Tangŝan kaj Fengnan, kaj faris gravan instrukcion al ili. Peng Jangang decidis, laŭ la instrukcio de Prezidanto Hua, konstrui sian hejmlokon pli bone kune kun la popolamasoj.



EKSPOZICIO DE KALIGRAFIAJ ĴOJ DE LERNANTOJ DE MEZAJ KAJ ELEMENTAJ LERNEJOJ

Antaŭ nelonge okazis en Ŝanhajo la nomita ekspozicio kaj la ekspozitaĵoj de la ĉina kaligrafia arto multe interesis la rigardantojn.

La ekspozicio kune aranĝita de la eduka kaj kultura organizoj de Ŝanhajo montris entute pli ol 270 verkojn. La plej juna el la aŭtoroj havas la aĝon de nur 7 jaroj.

La titolo de la ekspozicio elegante skribita de 16-jara mezlernejanino Hin Li en Liŝu-stilo montris sufiĉe altan nivelon de tiu arto.

La malgrandaj kaligrafoj skribis en diversaj kaligrafiaj stiloj poemojn kaj vortojn de Prezidanto Maŭ, Ĉefministro Ĝoŭ kaj verkistoj Guo Moĵuo, Maŭdun, Ĝaŭ Puĉu k. a.

Ankaŭ imitaĵoj de skribaĵoj de nuntempaj kaj antikvaj kaligrafoj same interesis la rigardantojn.

Serĉi akvofonton por kampanoj

EN la okcidenta parto de Henan-provinco de nia lando troviĝas Mihian-gubernio, du trionoj de kies areo estas en montregiono. De antikveco en tiu loko treege mankis akvo kaj la kreskado de plantaĵoj dependis de favoro de la naturo. En la lastaj jaroj oni trovis abundan subteran akvon en tiu loko kaj fosis nombron da profundaj putoj kaj per tio komencis ŝanĝi ĝian fizionomion de sekeco kaj manko de akvo. Parolante pri la ŝanĝo la tieaj kampanoj laŭdis la fontoserĉistojn.

Antaŭ 11 jaroj la gvidanta organo sendis fontoserĉistan grupon konsistantan el Kiang Ang, Gia Hjuejan kaj aliaj geologoj al la montregiono de Mihian-gubernio. La tieaj kampanoj tre ĝojis pro la alveno de ili. Prenante iliajn manojn, kelkaj maljunaj kampanoj rakontis al ili la suferon de akvomanko de la gubernio en la pasinteco.

Antaŭ la Liberiĝo, la bienuloj regis plejparton de la fontoj de la tuta gubernio kaj kruele ekspluatis la kampanojn. Por preni du sitelojn da akvo kampano devis labori duontagon por bienulo, aŭ pagi 1 kg. da tritiko por ricevi 1 kg. da akvo. Kaj iuj trompistoj laŭvole difinis ĉie lokojn por fosi putojn per superstiĉa aktivado. Per tio ili trompakiris multe da mono de kampanoj, sed restigis al ili nur senakvajn truojn. En 1942, Henan suferis teruran sekecon. Preskaŭ duono de la 320,000 popolanoj de Mihian-gubernio forfuĝis kaj 30,000 el ili mortis pro soifo kaj malsato.

Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, la kampanoj irantaj la kolektivigan vojon, aktive konstruis akvokonservejon kaj cisternojn, ili

faris klopodojn por akiri akvon por kontentigi la bezonon de homoj kaj brutoj kaj disvolvi agrikulturon. Sed antaŭ la Granda Proleta Kultura Revolucio komencita en 1966 la subtera akvo de la tuta gubernio estis ne bone ekspluatita kaj utiligita, kaj la problemo de manko de akvo ne estis solvita. Kiel ili deziregis ke la nove venintaj junuloj malkovru la subteran sekreton, eltrovu akvoriĉajn fontojn kaj finu la historion de akvomanko de tiu gubernio!

La sufero de la kampanoj pro manko de akvo en la pasinteco kaj ilia sopiro al akvo profunde kortuŝis ĉiujn grupanojn. Sub la bakanta suno, ili piediris trans montojn kaj diligente esploris malgraŭ laco. Post la unuapaŝa enketado, ili konstatis, ke la geologia strukturo de Mihian-gubernio, escepte de tiu de la norda parto el purpurruĝa skisto, estas el kalkoŝtono. La pluvakvo en la lokoj de skisto ĉiom forfluis de la surfaco; kaj la lasta estas truoza, tial pluvakvo malaperis de la tersurfaco tuj post ĉeso de pluvo, tio kaŭzis ekstreman mankon de tersurfaca akvo. Laŭ sperto de antaŭuloj, oni malfacile trovis akvon en tia loko. Sed, la grupo ne haltis antaŭ tiu konkludo de antaŭuloj kaj ili decidis fari novan konkludon per diligenta laboro.

Iutage, la grupo venis al Ĉennaŭ-brigado en la norda parto, al kiu treege mankis akvo, por geologia esploro. Maljuna avo sciigis al ili, ke oblikva puto troviĝas ĉ. 3 kilometrojn for de la vilaĝo. Alveninte tien ili vidis ke en ĝi malrapide fluas fonteto el fendo de purpurruĝa skisto. Tiu trovaĵo tuj klarigis ilian penson: Kvankam la purpura skisto estas ne penetrebla



Geologoj analizas rokon.

por akvo, tamen ĝiaj faŭltaj kaj efloreskaj zonoj kaj la kalkoŝtonoj inter tavoloj en ĝi povas tralasi akvon. En la skista faŭlta zono proksime de la oblikva puto ili boris puton. Kiam la profundeco atingis 20 metrojn, elfluis akvo kiel atendite. Poste, ili denove boris nombron da putoj laŭ la strukturo de la skistostratumo kaj sukcesis en tio.

Ĉu oni povas trovi subteran akvon en la vasta kalkoŝtona areo? Iuj diris al tiu grupo, ke en la pasinteco oni fosis en la loko ĉirkaŭ mil putojn malprofundajn, sed neniu el ili donis akvon. Frue en King-dinastio (1616 — 1911 p.K.) oni jam enĉizis jenan aserton sur ŝtonon: “En tiu ĉi alta seka loko oni ne povas trovi fonton.” Tamen la grupanoj ne perdis sian fidon. Ili samtempe faris geologian esploradon kaj kolektis informojn en proksimaj karbominejoj. Du karbominejoj iam renkontis ŝprucantan akvon dum konstruado. Tio tiris ilian atenton. Ili eniris la galerion kaj esploris la geologian strukturon de la loko el kiu ŝprucis akvo. Fine ili trovis la stratumon entenantan subteran akvon. Laŭ tio ili faris analizon pri iu senakva puto, opiniis, ke la profundeco de la senakva puto ankoraŭ ne atingis la akvotenantan stratumon, kaj konvin-

kiĝis ke akvo ŝprucos, se oni plue boros malsupren je ĉ. 90 metroj.

Kjuzuj-brigado, kie troviĝas tiu senakva puto, estas fame konata pro sekeco, kaj ĝia stratumo estas tute kalkoŝtona. Oni diris ke la puto estis ekfositita en 1848. Sub la preteksto de fosado de puto bienuloj kaj lokaj tiranoj multe ĉantaĝis la vilaĝanojn. La puton ili fosis kvar generaciojn, sed ĝis la antaŭvespero de la Liberiĝo ĝia profundeco atingis nur 10 metrojn kaj akvo ne aperis en ĝi. Post la Liberiĝo, la kamparanoj fosis malsupren je pliaj 17 metroj, tamen akvo ankoraŭ ne aperis en ĝi. Multaj popolanoj ekkredis la surskribon sur la ŝtono kaj perdis la fidon.

La grupo klarigis al la partia filio de la brigado kaj la komunumanoj la kaŭzon de la malsukceso, kaj oni denove eklaboris kun la kamparanoj. En marto de 1968, kiam la puto estis borita ĝis la profundeco de 93 metroj, elŝprucis akvo. La kvanto de elflua akvo ĉiuhore atingis 80 tunojn. Tiu estas la unua profunda puto sukcese borita en kalkoŝtona regiono de Mihian-gubernio. Kamparanoj junaj kaj maljunaj alvenis de dekojn da kilometroj fore por ĝin rigardi. Kiam la klara putakvo fluis en sekajn kampojn, ili ĝoje ludis leondancon kaj prezentis batalarton por celebri la sukceson.

Dank’ al la puto, solviĝis la problemo de vivbezona akvo de la tri ĉirkaŭaj brigadoj kaj la mua produktokvanto de greno de Kjuzuj-brigado pliiĝis de ĉ. 50 kg. de 1967 ĝis 250 kg. kaj iuj kampoj eĉ produktis po 5,000 kg. da legomoj aŭ 500 kg. da greno en muo. Ĉar la borado de tiu puto daŭris kvin generaciojn, oni nomas ĝin “Puto Kvingeneracia”. Oni translokis la ŝtonon al la puto, por ke la popolo memoru de generacio al generacio la bonecon de la Partio kaj Prezidanto Maŭ.

En la pasintaj jaroj, sub la gvido de la gubernia partia komitato kaj la helpado de la amasoj la grupo trairis la montojn kaj valojn, vizitis milojn kaj milojn da familioj de la gubernio kaj fundamente elkonis la leĝon de dislokiĝo de subtera akvo en ĝi. Ili boris sume pli ol 2,000 putojn, el kiuj pli ol 90% estas sukcesaj. Tio ne nur solvis la problemon de provizado de



Instruado al amasoj pri difino de loko de putoj

vivbezona akvo de la 150,000 popolanoj de la tuta gubernio, sed ankaŭ pliigis 130,000 muojn da irigacieblaj kampoj kaj pretigis kondiĉon por tiu gubernio lerni de Daĝaj en agrikulturo. La mua produktokvanto de greno de la gubernio multe kreskis, atingis aŭ superis 250 kg., la kvanton difinitan en la Tutlanda Programo de Agrikultura Disvolvado.

Nun la grupo forlasos la gubernion Mihian kaj iros al alia akvomanka loko. La ekspluatado kaj utiligado de subtera akvo ankoraŭ ne finiĝis. En la lastaj jaroj, dank' al diskoniĝo de hidrogeologiaj scioj fare de la grupo inter la popolamasoj, multaj homoj inkluzive de la sekretario de la gubernia partia komitato posedis tiuflankajn sciojn. Kaj per lekciado kaj instruado de unuopaj helpantoj ili kulturis por la gubernio teknikajn fortojn de hidrogeologio, kiuj povas sendepende bori putojn. Kaj la fondiĝo de prospektora grupo kaj speciala taĉmento por putborado ebligis al Mihian-gubernio pli vaste kaj efike disvolvi sian laboron de ekspluatado kaj utiligado de subtera akvo.

En nia lando nun laboras pli ol 200 tiaj fontoserĉistaj grupoj. Laŭ la karakterizaĵoj de klimato kaj geografio de Ĉinio, ili metis la gravitan punkton de prospektorado de subtera akvo en la nordajn regionojn suferantajn de sekeco kaj manko de pluvo, kaj ili liveris necesan hidrogeologian materialon por racie ekspluati kaj utiligi subteran akvon. Laŭ nekompleta statistiko de deksep nordaj provincoj, urboj kaj aŭtonomaj regionoj, ekde la jaro 1966 la nombro de la gubernioj, kiuj bori putojn, jam atingis 850, t.e. 70% de la pli ol 1,200 nordaj gubernioj de nia lando. La irigaciebla areo plivastiĝis je pli ol 50,000,000 muoj (1 muo = 1/15 hektaro) kaj 20,000 agrikulturaj brigadoj finis sian historion de manko de akvo. 1,000 brigadoj de paŝtado jam solvis la problemon de provizado de siaj gregoj per akvo. La provincoj Hebej, Henan kaj Ŝandong al kiuj longtempe mankis greno jam povas produkti ne nur sufiĉe da greno por sia bezono, sed eĉ superfluan grenon ekde la jaro 1974, dank' al akiro de akvo kaj faro de aliaj efikaj aranĝoj.

EN HUHEHOTO

de LIU GONG

HUHEHOTO fore de Pekino je 800 kilometroj estas la ĉefurbo de la Aŭtonoma Regiono de Ĥerna Mongolio. Tiu nacimalplimulta urbo sur la stepo estas interesa kaj alloga por tiuj kiuj neniam vizitis ĝin.

Okaze de celebrado de la 30-a datreveno de la fondiĝo de la aŭtonoma regiono ni vizitis tiun antikvan urbon.

Atinginte la urbon ni vidis larĝajn asfaltitajn stratojn borderitajn de altaj poploj, novajn etaĝdomojn en verdaj kaj altaj tabuloj kun kolora propaganda pentraĵo starigitan ĉe ĉefa vojkruciĝo por festado. Sur la pentraĵo vidiĝis popolanoj de la stepo, kiuj alte tenis oran pokalon kaj kantis la plej belan kanton al Prezidanto Hua kaj al la Centra Komitato de la Partio. La tuta urbo pleniĝis je gaja atmosfero.

La Strato Ĝongŝan de Huhehoto





La Fervoja Stacio de Huhehoto

“VERDA URBO”

Lokaj kamaradoj gvidantaj nin en la vizitado fervore rakontis al ni la hodiaŭan prosperecon de la urbo kaj ĝian suferplenan pasintecon.

Tiu ĉi urbo en la norda limregiono de Ĉinio aperis en la jaro 1581. Ĉar norde de ĝi estas la majesta Daking-montaro kaj sude de ĝi fluas branĉo de la Flava Rivero Dahej-rivero, tial la mongoloj nomis tiun urbon ĉirkaŭatan de verdaj montaro kaj rivero Huhehoto, kiu signifas en la mongola lingvo “verdan urbon”. Sed en la malnova socio la feŭdaj regantoj donis al ĝi plurajn nomojn karakterizitajn de nacia diskriminacio kaj nacia subpremado, kiuj estis uzataj ĝis la Liberiĝo de la tuta lando.

En 1924 la popolo de la Interna Mongolio konstruis organizon de la Komunista Partio de Ĉinio, kiu gvidis la mongolajn kaj hanajn popolarojn en malfacila batalado kontraŭ la regantoj. En 1949 la “Verda Urbo” revenis en la sinon de la popolo. En 1954 la Centra Popola Registaro decidis aboli ĝian malnovan nomon kaj restarigi ĝian mongolan nomon Huhehoto kaj translokis tien la ĉefurbon de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio.

Ni pririgardis la restaĵojn de la malnova urbo. Tie sur la siatempa brua strato povas veturi nur unu ĵipo kaj ambaŭflanke de la strato estas malaltaj terkabanoj. La mizero kaj suferoj de la popolo en la malnova socio estas neesprimeblaj per lingvo.

Kiel aspektas la nuna Huhehoto?

Post la Liberiĝo en la urbo konstruiĝis mil etaĝdomoj kun plankaro de pli ol kvin milionoj da kvadrataj metroj, kaj pli ol 400 asfaltitaj stratoj. La nombro de la urbanoj kreskis de 120,000 en la komenca periodo post la Liberiĝo ĝis 450,000 nun.

Antaŭ la Liberiĝo en la urbo troviĝis nur dekelk malgrandaj fabrikoj kaj metiejoj kun malpli ol mil laboristoj. Nun jam konstruiĝis 584 fabrikoj kun pli ol cent mil laboristoj kaj oficistoj kaj funkcias pli ol dek industrioj de metalurgio, maŝinfarado, elektro, tekstilaĵoj, konstruado, metalaĵoj, materialo, elektroniko, farmacio kaj malpeza kaj kemia industrioj.

Interna Mongolio estas loko abunda je ŝafalano. Tamen antaŭ la Liberiĝo en Huhehoto estis nur unu lana tekstila fabriko kun pli ol 200

laboristoj kaj oficistoj, kiu povis produkti nur krudan lanŝtofon. Nun rapide progresas lantekstila industrio kun nacia karaktero kaj jam formiĝis tie kompare kompleta lantekstila sistemo, kaj la loko fariĝis lantekstila bazo de nia lando. La relative grandaj unua, dua kaj tria lantekstilaj fabrikoj kaj fabriko de lanaj fadenoj povas produkti kaj prilabori pli ol 50 specojn da produktaĵoj kun pli ol 200 variaĵoj el kruda materialo de la aŭtonoma regiono.

FABRIKOJ DE SPECIALAJ BEZONAĴOJ POR MONGOLOJ

En Huhehoto ni vizitis kelkajn fabrikojn kiuj rekte servas al brutobredado de Interna Mongolio, ekzemple la fabrikon de biologiaj medikamentoj por brutoj kaj la fabrikon de elektra tondomaŝino, kiu havas kvar tondilojn kaj estas malgranda, malpeza, bonkvalita kaj bonvena al la paŝtistoj.

En la urbo estas kelkaj fabrikoj produktantaj pli ol 280 specojn de specialaj vivbezonaĵoj por la paŝtistoj. La plej granda el ili produktas mongolan boton, rajdistan boton, selon, jungilaron, latunan pipon, mongolan tranĉilon k. a. sume 22 specojn.

Aparte ĉarma estas mongola tranĉilo, la vera metiartaĵo. Junaj paŝtistoj kunportas ĝin ankaŭ kiel ornamaĵon. Ĝia klingo el speciala ŝtalo

estas tre akra. Ĝiaj tenilo kaj ingo estas tre delikataj. La tenilo estas farita el zizifa ligno kaj sur la ingo estas inkrustitaj arĝentaj aŭ kupraj desegnoj aŭ memorigaj skribaĵoj. Sur la ingo troviĝas du truetoj por enteni du manĝvergetojn. Rajdante sur ruĝa ĉevalo kun tia tranĉilo ĉe la talio paŝtisto aspektas vere brave!

Oni diris al ni, ke la Partio kaj la registaro tre zorgas la vivon de la paŝtistoj kaj ĉiamaniere klopodas por produktigi tion kion ili bezonas.

EN NACIECA LERNEJO

Iun antaŭtagmezon ni vizitis unuan klason de iu nacieca lernejo.

Instruistino Sajengejel kun okulvitroj serioze kaj afable instruis la lernantojn voĉlegi tekston en la mongola lingvo. Ŝi scias ankaŭ la hanan lingvon kaj jam laboris en la lernejo pli ol 10 jarojn. Post voĉlegado ŝi elmetis kelkajn demandojn. Apenaŭ ŝi finis sian demandadon la infanoj preskaŭ ĉiuj levis sian manon por peti permeson respondi. Ni estas analfabetoj de la mongola lingvo, tamen ni povis vidi, ke la instruistino kaj lernantoj estas senĝenaj kaj la infanoj respondis tre libere kaj flue.

Post aŭskultado de la leciono nin akceptis iu lerneja gvidanto mongola. Li nomiĝas Muĥ kaj povas paroli flue ankaŭ en la hana lingvo. Li



*Laboristinoj de la
Kemifibra Fabriko
de Interna Mongolio*



Senĉese altiĝas la kvalito de la specialaj varoj por la mongoloj.

diris al ni, ke la lernejo praktikas dekjaran sistemon kaj faras instruadon per la mongola kaj hana lingvoj. Ĝi fondiĝis en la urbo Ĝanggiakoŭ en 1948 kaj translokiĝis en Huhehoton en 1951. Tiam ĝi estis nur elementa lernejo kun 3 instruistoj kaj pli ol 30 lernantoj. Nun ĝi jam havas 29 grupojn kun pli ol 1,300 lernantoj kaj pli ol 100 instruistoj, kiuj plejparte estas mongoloj.

Parolante pri la instruado, Muĥ citis jenajn vortojn de Prezidanto Maŭ: **“Oni devas respekti la kulturon, kutimojn kaj religion de ĉiuj nacimallimultoj. Oni ne nur ne devas devigi ilin lerni la hanan lingvon sed ankaŭ devas helpi ilin disvolvi la kulturan laboron kaj edukon uzantajn iliajn proprajn lingvojn.”** En la lernejo estas, krom mongolaj lernantoj, ankaŭ malmultaj hanaj infanoj. Por krei favoran kondiĉon de lernado, la lernantoj povas loĝi en la lernejo, kaj estas specialaj homoj por zorgi tiujn de malaltaj klasoj en la vivo.

Muĥ ĝoje diris ankaŭ, ke la registaro tre zorgas la naciecan kulturan kaj edukon aferojn kaj multe zorgas la disvolvon de la lernejoj. Ilia lernejo jam estas permesita konstrui domegon

kun klasĉambroj por 40 grupoj kun 2,000 lernantoj.

Nun en la urbo kaj la antaŭurboj estas sume 4 mongolaj mezlernejoj. En la ordinaraj elementaj kaj mezaj lernejoj funkcias mongolaj klasoj. Preskaŭ 7,000 lernantoj studas en tiaj mezlernejoj kaj klasoj. En la historio troviĝis neniu alta lernejo en Huhehoto. De post 1957 fondiĝis 5 altaj lernejoj inkluzive de la Universitato de Interna Mongolio. Por plibonigi instruadon de la mongola lingvo, la eduka fako de la urbo fondis en normala lernejo kurson de la mongola lingvo. La aŭtonoma regiono fondis en Huhehoto mongollingvan kolecion kaj mongollingva fako jam instaliĝis en pluraj altaj lernejoj.

Interalie ni iom parolu pri la sanprotekta laboro de Huhehoto. En la pasinteco epidemioj ofte minacadis la vivon de la vasta amaso. Nun tie funkcias 366 sanprotektaj instalaĵoj kun 3,184 malsanulaj litoj, kiuj estas pli-ol-13-oblo de tiuj antaŭ la Liberiĝo. La Hospitalo de Interna Mongolio kun plankareo de 20,000 kvadrataj metroj en la sudorienta antaŭurbo estas

la plej granda hospitalo de la aŭtonoma regiono. Ĝi havas pli ol 170 kuracistojn, 550 malsanulajn litojn kaj avangardajn medicinajn aparatojn kaj ekipaĵojn kaj povas fari komplikajn kranian operacion.

HEJMO DE PAŬTISTOJ

Huhehoto estas la politika, ekonomia kaj kultura centro de Interna Mongolio kaj ĝi havas striktan interrilaton kun la vasta stepo. Tie ni rigardis paŭtistan hotelon, kiun oni nomas hejmo de paŭtistoj.


La hotelo fondiĝis en 1955 kaj en la komenco ĝi havis nur 140 litojn. Nun la hotelo jam havas etaĝdomon kun plankareo de preskaŭ 5,000 kvadrataj metroj kaj en ĝi laboras preskaŭ 100 servistoj. Ĝia tasko estas akcepti bazajn kadrojn kaj paŭtistojn el la stepo. Ĝi akceptis ankaŭ nacimalplimultajn gastojn el Hingiang, Tibeto, Gansu kaj Ninghia. En la pasintaj pli ol 20 jaroj, ĝi akceptis sume 1,750,000 nacimalplimultajn gastojn.

Kial oni nomas la hotelon Hejmo de Paŭtistoj? Ĉar ĝi ĉiam kaj en ĉio estas oportuna al paŭtistoj.

La lupago estas malalta, kaj en ĝia menuo troviĝas laktoteo, rostita milio, mongola vianda plado k. a. ŝatataj de mongolaj paŭtistoj.

Konsiderante, ke iuj el la vojaĝantoj venis al la urbo por peti kurachelpon, la hotelo ĉiamaniere klopodas por helpi ilin en tio. Ekzemple ĝi instigis koncernan medicinan fakon fondi en la hotelo klinikon de Ĉina, okcidenta kaj mongola medicinoj, tiel ke ne tre gravaj malsanuloj loĝantaj en la hotelo ne bezonas viziti hospitalon. Kaj la hotelo helpas gravajn malsanulojn procedi por enhospitaliĝi aŭ sendas akutajn malsanulojn per aŭto al hospitalo. Okaze de festo la hotelo invitas artajn trupojn fari prezentadon por la paŭtistoj-gastoj. Por ke la paŭtistoj el malproksimaj lokoj konu la progreson de la ĉefurbo de la aŭtonoma regiono, ĝi organizas ilin por rigardi la urbon kaj viziti fabrikojn.

Iu gvidanto de la hotelo Ujengendalaj diris, ke ili akceptas diversnaciecajn gefratojn el la stepo kaj ili devas fari, ke la gastoj sentu tute kiel hejme. Foje iu respondeculo de la hotelo ricevis telegramon de iu paŭtisto el malproksima orienta Uĝumkin-ajmago. La lasta kun sia filo, kiu suferis de osta tuberkulozo, iam loĝis en la hotelo. Nun li demandis en la telegramo, ĉu lia filo, nun atakata de morbilo, povas daŭre preni la medikamentojn preskribitajn de kuracisto por osta tuberkulozo. Leginte la telegramon, la respondeculo tre emociiĝis pro konfido de la paŭtisto al li kaj li decidis ankoraŭ pli bone plenumi sian servadon.



*La Universitato de
Interna Mongolio*

ESPERANTAJ NOVAĴOJ

Franca esperantisto en Ĉinio

LASTATEMPE franca esperantisto R. Martin vizitis Ĉinion kiel membro de amika delegacio el Marsejlo. La delegacio vizitis diversajn lokojn en Ĉinio dum ĉirkaŭ duon-monato. Profitante la restadon de la delegacio en Pekino ses geesperantistoj de la redakcio de

EPC kaj Guozi Shudian renkontiĝis kun li en hotelo por havi agrablan interparolon.

La gasto jam vizitis la landon antaŭ kvin jaroj kaj ĉifoje estas por li la dua vizito. Lin multe impresis la granda ŝanĝiĝo de la lando. Oni parolis pri la utilo de EPC por reciproka kompreniĝo inter la du landoj kaj pri plibonigeblecoj de la gazeto. La Esperanta movado en

Franco kaj la mondo ĝenerale estis alia paroltemo, pri kiu la ĉinaj esperantistoj kun granda intereso multe informiĝis de la gasto. La konversacio finiĝis per reciproka prezento de donacaĵoj. Cetere estis kore esprimita la espero, ke post kelkaj jaroj la franca kamarado ankoraŭfoje vizitos la landon.

La 62-a Universala Kongreso de Esperanto

La 62-a Universala Kongreso de Esperanto okazis en Rejkjaviko, la

Li denove iros sur la laboran postenon

En majo de 1975, kiam jugoslava kargoŝipo ankris ĉe la haveno Kinhuangdaŭ de Ĉinio, ĝia juna maristo Branko Kalabric rompis al si la dekstran kruron. Post urĝa savado en hospitalo de Pekino lia kruro estis rekunigita kaj poste li revenis al sia patrolando.

Pri la travivaĵo de Branko en Ĉinio nia gazeto jam raportis en la numero 9 de 1975. Jam pasis pli ol du jaroj, kiel nun li fartas? Antaŭ nelonge ĵurnalistoj de Hinhua-novajagentejo intervjuis lin. Ĉisube estas ilia raporto pri tiu intervjuo.

— La Red.

Branko Kalabric ripozis en sanatorio ĉe marbordo de Adriatiko. Ĉar ni neniam vidis lin antaŭe, tial ni atente observis ĉiun pasanton en la akceptejo, precipe tiujn malfacile irantajn kaj lamulojn kun lambastono. Post iom da tempo iu junulo rapide malsupreniris la ŝtuparon. Li ne vekis ĉe ni atenton. Tamen, kun rideto li

rekte venis al ni. Alproksimiĝinte li etendis siajn manojn kaj laŭte diris en la ĉina lingvo: "Saluton!" Nur tiam ni kredis, ke li estas Branko Kalabric. La 21-jara junulo estas altstatura kaj ruĝvanga, en sporta kostumo. Kun tre bona humoro li ekparolis antaŭ ol ni elmetis al li demandojn.

ĉefurbo de Islando, 31. julio — 6. aŭgusto 1977, sub la Alta Protektado de Prezidento de la Islanda Respubliko, D-ro Kristjan Eldjarn. La Universitato de Islando disponigis siajn ejojn al la Kongreso. Entute aliĝis 1200 personoj el 41 landoj al la Kongreso, kaj partoprenis iom pli ol mil. La Inaŭguron ĉeestis neordinare multaj eminentuloj el ekster la Esperantomovado, i. a. la Alta Protektanto, D-ro Eldjarn, kun sia edzino. La kultur-ministro de Islando Vilhjalmmuro Hjalmarsson, la urbestro de Rejkjaviko, Birgir Islejfur Gunnarsson, kiuj ambaŭ salutparoladis al la Kongreso en bona Esperanto, kaj la Ĝenerala Direktoro de UNESKO,

s-ro Amadoŭ-Mahtas M'Bow de Senegalio, kiu faris gravan paroladon pri la temo de la Kongreso, "La Rajto je Komunikado". La Inaŭguron ĉeestis ankaŭ reprezentantoj de multaj ambasadoroj en Islando, i. a. de la Ambasado de Ĉinio, Unua Sekretario s-ro Liu.

Kiel menciite la ĉeftemo de la Kongreso estis "La Rajto je Komunikado", kiu kongruas kun la ĉeftemo de UNESKO en tiu ĉi jaro. Ĝi estis diskutata en ĝeneralaj kunidoj, kaj en malgrandaj laborkunidoj, kiuj pritraktis apartajn aspektojn de la temo. Atentinde estas, ke iujn el la diskutoj partoprenis ankaŭ personoj el ekster la vicoj de la

esperantistoj, i. a. la sekretario de la UNESKO-Komisiono en Islando, S-ro Andri Isaksson.

Kulturaj kaj distraj aranĝoj estis multaj kaj elstaraj: Internacia Arta Vespero, Islanda Vespero, Pola Teatro kaj, pinte, la teatraĵo INUK, prezentita de kvinaktora grupo de la Nacia Teatro de Islando en perfekta Esperanto.

La Kongreso estis vaste priraportita en la islandaj amasmedioj, i. a. okazis duonhora diskuto tute en Esperanto en la Islanda Televido, pri la Kongresa temo.

(**Baldur Ragnarsson**, Prezidanto de la Islanda Esperanto-Asocio)

En majo de 1975, Branko Kalabric revenis de Ĉinio al Jugoslavio. Nelonge poste li venis al la pitoreska marborda sanatorio por ricevi tie fizioterapion, ekzerci sian kruron kaj piedon kaj fortigi sin. Post unu monato li jam povis forlasi la lambastonon. En la sanatorio, li atente protektis kaj ekzercis la rekunigitan kruron kaj ĝustigis sian irmanieron laŭ la atentigoj de la ĉinaj kaj jugoslavaj kuracistoj. Dank' al tio la funkciado de la kruro iom post iom pliboniĝis kaj lia korpo plifortiĝis. Dum la interparolado li faris diversajn movadojn per la dekstra kruro kaj piedo antaŭ ni.

Li ankaŭ prezentis al ni multajn fotojn, inter kiuj estas kelkaj koloraj fotoj faritaj de ĉinaj kuracistoj pri lia dekstra kruro antaŭ kaj post la rekuniĝo. Iu maljuna virino kun scivolemo alpaŝis por rigardi. Kaj ŝi mire diris: "Vere nekredeble." "Kiel feliĉe estas, ke la rompita kruro povas esti tiel bone rekunigita."

Parolante pri sia estonta laboro li diris: "Mi elhospitaliĝos post kelkaj monatoj. Mi ankoraŭ volas daŭre labori sur la ŝipo kaj navigi sur maro." Lia deziro estas tute natura. Branko Kalabric naskiĝis sur apudborda insulo en Adria-

tiko. La tieaj popolanoj sin okupas pri navigado kaj kolektado de akvoproduktaĵoj de generacio al generacio. En sia lernotempo li jam revis navigi sur vastaj maroj. Kiam li estis en la aĝo de 18 jaroj, vere efektiviĝis lia deziro. Li suriris la kargoŝipon Mosa Pijade de Jugoslavio kaj komencis sian surmaran vivon. Tamen, malfeliĉo trafis lin en lia unua navigado. Tiam li pensis, ke lia dekstra kruro estas rompita kaj li fariĝos kriplulo en la tuta vivo. Sed, en Pekino, lia kruro estis bone rekunigita, kio firmigis lian fidon daŭre sin okupi pri navigado. Li diris: "Mi veturos ankoraŭfoje al Ĉinio por vidi miajn ĉinajn amikojn." Branko Kalabric rakontis al ni la tagojn pasigitajn de li en Ĉinio kaj la klopodadon de la ĉinaj kamaradoj por savi lin, kaj montris al ni varmajn leterojn el malproksima Ĉinio.

Ĉe adiaŭo, Kalabric akompanis nin ĝis la pordo. Li firme manpremis kun ni kaj diris: "Bonvolu transdoni mian koran saluton al la ĉinaj kuracistoj kaj flegistinoj kiuj donis al mi helpon."

Lastatempe ni informiĝis el radiodisaŭdigo pri elhospitaliĝo de Kalabric. Kun ĝojo ni telefonis


al li, kaj li sciigis al ni ke li jam forlasis la sanatorion kaj revenis al sia hejmloko. Kiam ni demandis pri lia kruro, el la telefono aŭdiĝis lia serena rido kaj respondo: “Bonege! Mi jam povas fari diversajn sportajn aktivadojn, precipe kuradon, naĝadon kaj eĉ futbalon.” “Futbalon?!” ni demandis kun miro. “Ĉu vi ne kredas? Do

venu kaj ni kune ludu.” Poste li viglanime rakontis al ni pri sia estonteco.

La revivigo de la rompita kruro de Branko jam vaste diskonigis inter la ĉinaj kaj jugoslavaj amikoj per la gazetoj kaj ĵurnaloj. Ili ĝojas pro tio, ke li denove iros sur la laboran postenon.

“Vi devas esti singardemaj!”

— Rememoro de la ĉeĥoslovaka popolo al J. Fuĉik ĉe la 34-a datreveno de lia martiriĝo



FORPASIL jam 34 jaroj post la martiriĝo de Julius Fuĉik, la fame konata kontraŭfaŝisma batalanto de Ĉeĥoslovakio. Dum la pli ol 30 jaroj, la heroo sentima batala spirito de Fuĉik ĉiam kuraĝigas la ĉeĥoslovakon popolon en justa batalo por oponi kontraŭ fremdlanda agreso kaj defendi la nacian sendependencon. Fuĉik estis revolucia ĵurnalisto, arestita de Gestapo pro subtera batalo kontraŭ faŝismo kaj heroo oferis sian vivon en la 8-a de septembro de 1943.

Okaze de la 34-a datreveno de la martiriĝo de Fuĉik oni metis respektoplene freŝajn florojn kaj florkronojn antaŭ lia monumento kaj busto en Prago por rememorigi lin. Hodiaŭ alfrontante la realon de la patrolando la ĉeĥoslovaka popolo ankoraŭ pli sopiras la nacian heroon, kiu oferis sian vivon por la nacia sendependeco kaj la libereco

de la popolo. Kun profunda sentimento oni rigardis la buston de Julius Fuĉik kun levita kapo kvazaŭ indigne insultanta faŝistajn rabistojn senbride tretantajn alies teritorion kaj alvokanta al sia popolo: “Ni neniam servos al obskura kaj sklaviga perforto.”

En la milita periodo, Fuĉik faris sekretan kontraŭfaŝisman batalon en Pilsen kaj malamikoj multfoje venis tien por kapti lin, sed ĉiufoje li sukcese fuĝis el la ungoj de la malamikoj helpate de amasoj. Hodiaŭ rememorante lin la pilsen-a popolo ankoraŭ pli indigniĝis kontraŭ la agresantoj. Iu ĉeĥoslovaka civitano diris: “Agresantoj de la potenco neniam trovos amikojn ĉi tie!”

En la 267-a karcero de la malliberejo en la orienta antaŭurbo de Prago, Fuĉik suferis 411-tagan krue-

lan turmentadon fare de Gestapo. Tamen la heroo tute ne submetiĝis al la pendingo kaj bajonetoj de la malamikoj. Kun revolucia heroeo kaj obstina persisteco li skribis la “Raporton sub Pendingo” en la karcero. Nun tie estas ekspozataj diversaj torturiloj kaj gilotino de la faŝistoj, kiuj vekis al la vizitantoj senkomparan indignon al la malamikoj. Kiam vizitantoj venas en la 267-an karceron kaj vidas la tablon uzitan de Fuĉik por skribi la “Raporton sub Pendingo” oni kvazaŭ vidas, ke Fuĉik estas rapide skribanta la verkon.

“En la vivo ne povas esti apudstaranto.”

“Vi devas esti singardemaj!”

Kiel pensigaj estas tiuj vortoj skribitaj de Fuĉik per sia sango kaj vivo!



Du pikturaj ekspozicioj

Eminentaj pentraĵoj de Rumanio

Oktobron de la kuranta jaro okazis en Pekino Ekspozicio de Rumanaj Pentraĵoj de la 19-a kaj 20-a Jarcentoj kaj estis varme bonvenigata de la ĉinaj vizitantoj.

Montriĝis en ĝi pli ol cent karakterizaj verkoj, kiuj vivece prezentas la bataladon de la rumana popolo por la sendependeco kaj libereco de sia nacio kaj la venko de la socialisma konstruado. Multaj verkoj spegulas la altan nivelon de pikturo de la rumana pentristoj en tiu periodo.

Enirinte la ekspoziciejon, oni tuj vidas la pentraĵon «La Revolucia Rumanio» de C. D. Rosenthal (1820—1851). La pentraĵo prezentas buston de virino en bela nacia kostumo. Ŝi tenas armilon kaj duone volvititan ruĝan flagon en la manoj kaj rigardas malproksimen. Ŝi estas simbolo de la «revolucia Rumanio». La figuro en la pentraĵo esprimas maltrankvilon pro la patrio en katastrofo kaj tamen fidon pri la venko de la revolucio. Tiu pentraĵo spegulas la burĝaran demokratian revolucion de Rumanio en la periodo 1848-1849.

Nicolae Grigorescu estis la plej fama pentristo de Rumanio en la 19-a jarcento. Li tre lertis en pentrado pri kamparaj pejzaĝoj, kamparana vivo kaj la spirita fizionomio de la kamparanoj. La olepentraĵo

«Juna Kamparanino» eminente prezentanta naivan simplan knabinon per lakona stilo rikoltis laŭdojn de la rigardantoj.

Grigorescu amis siajn patrion kaj popolon. En la 19-a jarcento, kiam la rumana popolo leviĝis kontraŭ la sklavigado de la reganta klaso de la metropolo, li iris al la fronto kaj faris multajn krokizojn kaj olepentraĵojn pri la milito por nacia sendependeco. La pentraĵoj «Signalo», «Stelo» kaj «Ruĝa Kavalerio» ĝuste temas pri ĝi. Lia grava verko

«Atako al Smirdan» temanta pri ŝlosila batalo en la milito de 1877-1878 de Rumanio por nacia sendependeco prezentas rumanan insurekcian trupon brave batalantan. Tiu pentraĵo kun grandioza kaj kortuŝa sceno estas glorkanto al patriotismo.

Ankaŭ la samtempuloj de Grigorescu, la pentristoj Theodor Aman kaj S. Hentia entuziasme prikantis la militon por nacia sendependeco per siaj penikoj. Rigardinte tiujn pentraĵojn, ni ekhavas pli da respekto al la frata rumana popolo kiu

«La 13-a de Decembro 1918» de Eugen Popa





En ekspoziciejo

«Alarmo» de Nicolae Grigorescu

amegas liberecon kaj sendependecon kaj sentime batalas kontraŭ perfortoj.

Inter la verkoj de la pentristoj aktivantaj en la periodo de la fino de la 19-a jarcento ĝis la mezo de la 20-a jarcento, la pentraĵo «La Jaro 1907» de Octav Bancila (1872-1944) aparte tiris atenton de la rigardantoj. Ĝi temas pri kampanara leviĝo. Ne povante toleri plu la longan kruelan ekspluatadon de la bienularo, la vasta kampanaro de Rumanio faris potencon leviĝon en printempo de 1907. Kvankam tiu leviĝo malsukcesis pro kruela subpremo de la reakcia regopotenco, tamen ĝi postlasis profundan influon. En sia verko, Bancila pentris furiozan batalon en plumba vetero: Multaj kadavroj de viktimoj sur la tero, kaj tamen la ĉefa kampanara figuro daŭre marŝas kun firme pugnigitaj manoj malgraŭ densa pafado. La pentristo pentris la heroan figuron tre hela en forta kontrasto kun la obskura ĉielo.

Tiu sceno preskaŭ resumis la tutan proceson kaj historian signifon de la leviĝo kaj profunde impresis nin.

La liberiĝo de Rumanio malfermis larĝan vojon por la kreado de la pentristoj. Por plene speguli la enhavoriĉan vivon en la socialisma periodo, la nuntempaj rumanaĵ pentristoj ofte uzas novajn formojn kaj sekve formiĝis multaj malsamaj stiloj. Inter la eksponitaj verkoj, kiuj profunde impresis la rigardantojn troviĝis «Konstruejo» de Marius Bunescu (1881-1971), «Ŝtalfandisto» de Corneliu Baba, «Rikolto» de P. G. Hadiu kaj «Tritiko kaj Petrolo» de Eugen Popa. Corneliu Baba estas malnova pentristo. En «Ŝtalfandisto» oni vidas laboristan figuron pentritan per fortaj strekoj. Liaj grandaj manoj sur la genuoj kaj lia aplomba kaj firmvola mieno montras la ŝtalan volon de la ŝtalfandistoj. La lerta realisma tekniko bazita sur longa ekzercado en tiu pentraĵo estas studinda por ĉinaj pentristoj.

Tiu ĉi ekspozicio ne nur havigis al la ĉina popolo kaj ĉinaj pentristoj ŝancon apreci rumanan pikturon sed ankaŭ profundigis nian komprenon pri la brila batala historio de la rumana popolo.

Pentraĵoj de ĉinaj kampanaroj en Britio

Pentraĵoj de ĉinaj kampanaroj de Huhian-gubernio, Senhi-provinco estis eksponataj pli ol 8 monatojn en Londono, Cardiff, Birmingham kaj Edinburgo de Britio.

La ekspozicio estas aranĝita de la Brita Arta Komitato. Inter la 77 eksponitaj pentraĵoj de pli ol 60 kampanaroj de Huhian-gubernio troviĝis «Maljuna Sekretario» de Liu Ĝide, «Printempa Sarkado» de Li Fenglan, «Fiŝbredejo de la Komunumo» de Dong Ĝengji, «Malgraŭ Vento kaj Pluvo» de Liu Hju kaj «Braveco» de Ĝang Ĝinfeng. Tiuj verkoj spegulas diversajn facetojn de la batala vivo de la popolo de

Huhian-gubernio. La dirita komitato ankaŭ projekciis lumbildojn pri la vivo kaj pentrado de la kamparanoj de Huhian-gubernio, kopiis iliajn pentraĵojn en kolorajn albumojn kaj foliojn kaj ilin disvendis. Tiuj pentraĵoj de laboruloj ĉie estis amase vizitataj, eĉ de pli ol 2,000 rigardantoj en unu tago. Kaj iuj el la rigardintoj eĉ alvenigis siajn parencojn kaj amikojn al la ekspozicio post sia vizitado.

La klaraj subjektoj, intensa vivotoso, malluksaj esprimmanieroj kaj optimismo de la kamparanaj pentraĵoj estis varme laŭdataj de la gazetaro kaj rigardantoj. Oni skribis en artikolo «Ĉinaj Pentristoj Laŭdas la Novan Vivmanieron»: “Tiuj pentraĵoj temas pri la ŝanĝoj de la ĉina kamparo, borado de putoj,

konstruado de irigacia sistemo, kreado de kampoj sur montoj, sciencaj eksperimentoj kaj agrikulturo de novaj metodoj. La pentristoj verkis kun granda entuziasmo kaj kuraĝe prikantas la popolamasojn. La pentraĵoj estas faritaj ne de apudstarantoj, sed de tiuj kiuj mem partoprenis en tiuj aferoj.” En alia artikolo «Bildigo de Sukcesoj» oni skribis: “Tio estas en Britio la unua ekspozicio de tiaj pentraĵoj kiuj plenas de optimismaj sentoj kaj prenas laboron kiel la temon. En tiuj pentraĵoj laboro ne plu estas laciga, teda, enuiga aŭ malestimata servo, sed afero plena de espero, plezuro kaj unuanima kunagado.” Iu semajna periodaĵo aperigis 8 kolorajn pentraĵojn de Huhian-aj kamparanoj sur kvar paĝoj. Iuj diris post vizito al la ekspozicio, ke la pentraĵoj

plimultigis ilian komprenon pri la nova Ĉinio kaj ili figure montris al li la sukcesojn atingitajn de la ĉina popolo en la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado.

Dum la ekspoziciado, la Brita Arta Komitato kaj la Brita-Ĉina Interkompreniga Asocio aranĝis plurajn raportajn kunvenojn, en kiuj britoj vizitintaj Ĉinion parolis pri siaj impresoj pri la socialisma Ĉinio. Brita arta komentariisto Guy Brett, kiu vizitis Huhian-gubernion de Ŝenhi-provinco en 1976 diris al ĉina ĵurnalisto: “La ekspozicio estas sukcesa. Antaŭ ĉio ni devas danki la kamparanojn-pentristojn de Huhian-gubernio, kiuj faris kontribuon per siaj penikoj al plifirmigo de la amikeco inter la popoloj de Britio kaj Ĉinio.”



LA LUOBAOJ

de ZONG MING

LA luoba-nacieco kun ĉ. 300,000 membroj loĝas ĉefe en Luoju-regiono de la sudorienta parto de la Tibeta Aŭtonoma Regiono.

Luoju, ĉe la suda piedo de Himalajo, abundas je pluvo kaj havas fekundan teron kaj varmetan klimaton en la tuta jaro. Ĝi abundas je produktaĵoj, kiel ekzemple nuda hordeo, tritiko, rizo, legumenacoj, brasiko, terpomo, kapsiko, bambuĉo, banano, pampelmuso, mandarino, persiko, piro, vinbero kaj akvomelono. Krome, en ĝiaj densaj arbaroj sin trovas tigroj, leopardoj, ursoj, cervoj, moskuloj, aproj, linkoj, lutroj kaj aliaj. En tiu riĉa loko la

luobaoj okupiĝas pri agrikulturo kaj ĉasado. Feloj, ursoplandoj, mosko, junaj cervokornoj kaj aliaj estas iliaj ĉefaj produktaĵoj por interŝanĝi kun alinaciecaj popolanoj. En sia infaneco la luobaoj jam sin ekzercas pri arkopafado, tial multaj el ili estas lertaj arkopafistoj kaj havas riĉan sperton en ĉasado. Ĉiu viro de tiu nacieco portas kun si arkon, sagojn kaj glavon kiel necesajn armilojn por sindefendo kaj ĉasado.

La luoba-nacieco estas membro de nia multnacieca familio kaj la regiono Luoju delonge jam estas konsistiga parto de nia Tibeto. La luobaoj starigis profundan amikecon

kun la menbaoj kaj tibetanoj en longtempa kontakto. En la lastaj cent jaroj ili plurfoje faris malcedo-

Luobaa junulino



man batalon kontraŭ arma agreso de imperiistoj kaj ekspansiistoj kaj severe punis la agresantojn.

Antaŭ la Liberiĝo, la miliono da tibetaj servutuloj suferis ekstreme kruelajn kaj barbarajn subpremadon kaj ekspluatadon de la loka registaro, aristokratoj kaj temploj de Tibeto. La luobaoj sub la feŭdisma servuta sistemo de la malnova Tibeto vivis en la plej malalta socitavolo kaj multe suferis diskriminacion. Ili estis kalumniitaj kiel "sovaĝuloj" kaj pelitaj sur montojn. La malnova loka registaro malpermesis al ili laŭvole descendi la montojn, fari ĉasadon aŭ fiŝadon sen permeso, trapasi la difinitajn limojn en komercado kaj geedziĝi kun tibetanoj. . . . Por plifortigi sian superregadon kaj ekspluatadon al la luobaoj, ĝi dividis Luoju-regionon en kelkajn sektorojn kaj sendis al ĝi oficistojn por kolekti impostojn. Ekzemple, ĝi ordonis, ke ĉiu el la luobaoj de Mingbu-vilaĝo pagu kapimposton per 4 uncoj da arĝento, 1 ursogalo, 4 ursoplendoj, 1 urso felo kaj 1 leoparda felo. Se iu ne povis pagi tiujn objektojn, la oficistoj bruligis lian domon kaj eĉ lin mortigis.

Tiam la luobaoj vivis tre mizere kaj loĝis en kabanaĉoj. Ilia agrikulturo plejparte restis en la primitiva stadio kaj la produktokvanto estis tre malalta. Pro malsufiĉo de greno, ili devis sin vivteni per frukto-kolektado, ĉasado kaj fiŝado. Manko de salo kaj nutraĵo kaŭzis

al multaj luobaoj surdmutecon kaj strumon. Malario, disenterio, ĥolero kaj aliaj epidemioj furiozis tiuloke, tial la luobaa loĝantaro reduktiĝis jaron post jaro.

Antaŭ la Liberiĝo la luobanacieco ankoraŭ estis en la stadio de genta sklava sistemo en la komenca periodo de la klasa socio. Laŭ la sanga rilato kaj la posedanteco de produktaj rimedoj ĝi dividiĝis en tri klasojn, nome mastroj, pleboj kaj sklavoj. La mastroj estis rigardataj kiel nobeloj. La pleboj kaj sklavoj estis rigardataj kiel malnoblaj homoj sen socia pozicio kaj ne povis geedziĝi kun la mastroj. La sklavoposedantoj ne nur ekspluatis la sklavojn, sed ankaŭ povis laŭplaĉe aĉeti, vendi, transvendi kaj hipoteki ilin aŭ preni ilin kiel dotajojn.

La vestoj de la luobaaj viroj kaj virinoj estas simplaj. La viroj portas veŝton trikitan el lanfadenoj kaj felon de sovaĝa bovo surdorse, ĉapon el urso felo, bambuo aŭ liano, orelingojn kaj kolringon, sed ne ŝuojn. La virinoj portas senkoluman kamizolon kun mallargaj manikoj kaj ĝisgenuan barelforman jupon el lano, iliaj kruroj estas vinditaj per tolo kaj ili ne portas ŝuojn.

Post kiam la ribelo farita de Dalai Lamao en 1959 estis frakasita, demokratia reformo estis farita en Tibeto kaj nur tiam la luobaoj ricevis plenan liberigon. En la demokratia reformo la luobaoj koncentre loĝantaj en la gubernioj Minling,

Meduo, Ĉaju, Lhunze kaj Nanghian eliris el profundaj arbaroj, akiris teron, brutojn, agrikulturilojn, semojn kaj domojn, surmetis al si bonajn vestojn kaj ekhavis sufiĉan grenon kaj salon. De tiam la sklavoj ĝuas la rajtojn de homo kaj fariĝis mastroj de la nova socio.

Por liberigi sin el malriĉeco kaj postigiĝinteco, la luobaa popolo komencis konstrui sian novan vivon sub helpo de la garnizonaj trupoj kaj la tibeta popolo. Ili forlasis la lignajn ŝovelilojn kaj ŝpatojn, lernis plugadon per brutoj kaj akiris la produktajn teknikojn de profunda plugado, sarkado, sterkado, insektoekstermado kaj aliaj. Tio ebligis al ili senĉesan kreskadon de la produktokvanto de greno.


Sub la ĝusta gvido de la Komunista Partio de Ĉinio, la luobaoj ekĝuis unuafoje en sia historio naciecan egalrajtecon kaj havas siajn reprezentantojn en la diversnivelaĵaj populaj registaroj de gubernio, distrikto kaj subdistrikto.

Dank' al la Granda Proleta Kultura Revolucio multe ŝanĝiĝis la fizionomio de la regiono de luobaoj. En 1969, en la alta tajdo de socialisma reformo al tibetaj agrikulturo kaj brutobredado fondiĝis populaj komunumoj en la regiono de luobaoj, kaj en la lastaj jaroj disvolviĝis tie la amasa movado de lerno de Daĝaj en agrikulturo. Ili faris grandskalan fundamentan konstruon de kampoj por grandigi la areon de agroj, kaj sekve de tio

Luobaaj milicianoj



Rotanga ponto



multe kreskis la produktokvanto de greno. Ni prenu Nanji-komunumon de Minling-gubernio koncentre loĝatan de luobaoj kiel ekzemplon. Du jarojn post ĝia fondiĝo la jara totala produktokvanto de greno jam atingis pli ol 117,000 kg, t. e. mez-nombre pli ol 600 kg. por ĉiu komunumano. En 1975, tiu komunumo akiris abundan rikolton de greno, unuafoje vendis al la ŝtato pli ol 28,000 kg. da greno kaj havigis al komunumanoj plian enspezon kaj novajn vestojn, litkovrilojn kaj meblojn. Nun ili vivas feliĉe kun sufiĉaj bezonaĵoj.

La luobaoj akiris ne nur liberon en politiko kaj ekonomio, sed ankaŭ la eblecon de eduko. En la pasinteco la luobaoj registris aferojn per tranĉsignoj sur lignopecoj kaj notis ciferojn per ŝnuraj nodoj, tio kaŭzis al ili multajn malfacilojn kaj donis al la malnova loka registaro, aristokratoj kaj temploj de Tibeto ŝancojn trompi kaj ekspluati la luobaojn. Post frakaso de la ribelo, la Partio kaj la popola registaro fondis tie elementajn lernejojn por geknaboj kaj vesperajn lernejojn por plenkreskuloj. En montvilaĝoj ili povas rigardi filmojn kaj legi librojn, gazetojn kaj ĵurnalojn. La luobaoj nun jam havas siajn librotenistojn, vendistojn, disaŭdigistojn, artajn propagandistojn kaj intelektulojn. En la pasinteco la luobaoj estis superstiĉaj. Kiam ili estis malsanaj, ili petis sorĉistojn por peli diablojn. Nun, la Partio kaj la popola registaro ofte sendas al iliaj vilaĝoj laborgrupojn por propagandi sciencajn sciojn kaj kuracajn taĉmentojn por preventi kaj kuraci malsanojn. En la lastaj jaroj la vilaĝoj de luobaoj starigis kuracajn staciojn kaj elbakis siajn nudpiedajn kuracistojn.

La luobaa popolo nun marŝas antaŭen sur la vojo de socialismaj revolucio kaj konstruado.



La okcidentiga movado de King-dinastio

de ŜI GIN

DE la sesdekaj ĝis la naŭdekaj jaroj de la 19-a jarcento leviĝis tajdo de okcidentiga movado inter la regantoj de King-dinastio. La tiel nomata okcidentiga movado estis klopodo de parto de la ĉinaj burokratoj-militaristoj sub la helpo de eksterlandaj agresantoj, por fondi militan kaj civilan industriojn kaj starigi modernajn terkaj mar-armeojn sub la slogano de "sinpotencigo" kaj "strebado al riĉiĝo de la lando", kun la celo subpremi la revoluciajn movadojn de la ĉina popolo kaj sekurigi sian feŭdan regadon. Siatempe oni nomis ilin "okcidentiga grupo". Iliaj ĉefaj reprezentantoj estis Ji Hin, Zeng Guofan, Li Hongĝang, Zuo Zongtang kaj aliaj.

La okcidentiga movado iom post iom disvolviĝis sub la ligiĝo de la ĉinaj kaj eksterlandaj kontraŭrevoluciaj fortoj dum la subpremado de la revolucia movado de la Tajping-a Ĉiela Regno.

La kamparana insurekcia milito kun la revolucio de la Tajping-a Ĉiela Regno kiel la centro peze batis la reakcian regadon de King-dinastio. En la komenco de la sesdekaj jaroj la reĝimo de King-dinastio jam estis radikale ŝancelita, pro timo antaŭ armiloj de imperiismo kaj bezono por subpremi la popolon princo Ji Hin de la centra registaro kaj la lokaj militaristoj Zeng Guofan, Li Hongĝang, Zuo Zongtang kaj aliaj sen-

skrupule genuiĝis antaŭ la agresantoj por "subpremi la popolon per helpo de fremdlandaj trupoj", prenante tion kiel metodon por savi la feŭdan regadon de pereco. Post la subpremado de la revolucio de la Tajping-a Ĉiela Regno, Li Hongĝang prezentis raporton al imperiestro Tongĝi en la jaro 1864, en kiu li diris: "La ĝusta vojo por ordigi la landon troviĝas en sinpotencigo; por sinpotencigo en la nuna situacio plej grave estas trejni la armeon; kaj tiucele oni devas unue fabriki armilojn." Tio signifis, ke fabriki armilojn estis la plej grava afero por defendi ilian reakcian regadon. Tiel ili komencis sian okcidentigan agadon antaŭ ĉio de la milita industrio sub la ŝildo de "sinpotencigo".

La "okcidentiga grupo" ne nur importis fremdlandajn pafilojn kaj kanonojn, sed ankaŭ mem fondis nombron da fabrikoj por mem fari municion kaj militŝipojn. Inter ili la relative grandaj estis la Giangnan-a Ĝenerala Maŝinfabrika, la Fuĝoŭ-a Ŝipkonstruejo kaj la Tiangin-a Maŝinfabrika. Krome ankaŭ lokaj burokratoj de iuj provincoj starigis nombron da militaj fabrikoj.

La milita industrio fondita de tiuj burokratoj estis funkciigata per helpo de fremdlandaj inĝenieroj, teknikistoj kaj laboristoj, ekipita tute per alilandaj maŝinoj kaj provizita per importitaj krudmaterialoj inkluzive de fero kaj karbo. Kaj

la administra povo super tiuj entreprenoj estis en la manoj de Zeng Guofan, Li Hongĝang kaj aliaj. La produktiveco de tiuj fabrikoj kaj la kvalito de iliaj produktaĵoj estis malaltaj, ĉar la tuta kapitalo investita por konstrui ilin devenis de la imposto de la registaro, ilia produktado ne celis interŝanĝon kaj la burokratoj estis fraŭdemaj kaj la administrado tre fuŝa. Ekzemple, la Giangnan-a Ĝenerala Maŝinfabriko povis fari nur jam delonge eksmodiĝintajn musketojn, kaj la Fuĝoŭ-a Ŝipkonstruejo povis kopii nur la malnovan tipon de eksterlando. La fakto pruvis, ke la produktoj de ilia milita industrio absolute ne taŭgis por rezisti kontraŭ eksterlandaj agresantoj kaj estis uzataj nur por masakri la popolon kaj subpremi la revolucion. Eĉ Li Hongĝang ne povis ne konfesi: “La armiloj estas uzablaj por ekstermi la enlandajn banditojn. Ĉu ili taŭgas por rezisti kontraŭ la eksterlandaj agresantoj, mi ne kuraĝas certigi.”

Kun la fondiĝo de la milita industrio en la sesdekaj jaroj, pli kaj pli grandiĝis la bezonataj kvantoj de krudaj materialoj kaj hejtajoj, senĉese intensiĝis transportado kaj multege da mono estis bezonata por funkciigi la militan industrion kaj salajri la kolosan armeon. La “okcidentiga grupo” forte sentis mankon de monrimedoj, tial ili proponis “nepre prosperigi la komercon” por sinpotencigo. En la komenco de la sepdekaj jaroj de la 19-a jarcento ili sin turnis al la tiel nomata “strebado al riĉiĝo de la lando” kaj komencis fondi la civilan industrion por antaŭenpuŝi la militan industrion. Inter la fame konataj entreprenoj fonditaj de ili estis la Ŝanhaja Buroo de Vaporŝipa Transportado, la Kajping-a Minejo kaj la Ŝanhaja Teksejo.

En la komenca periodo tiuj entreprenoj prenis la formon de “inves-

tado per privatuloj sub la kontrolo de la registaro”, t.e. la investo estis de privatuloj kaj la registaro nomis direktoron (fabrikestron) por supervidi kaj administri la entreprenon. Ĉar tiuj entreprenoj estis superregataj de burokratoj kaj militestroj, la entreprenoj fariĝis burokratismaj. Krome la burokratoj fraŭdis malprofite al la investintoj. Tio grave kompromitis la aktivecon de privatuloj en la investado. Ni prenu la Ŝanhajan Teksejon kiel ekzemplon. Ĝi estis la unua teksejo starigita de la okcidentiga grupo. Ĝiaj teksiloj estis importitaj el Britio kaj Usono, kaj la dungitaj inĝenieroj estis el Usono. La teksejo komencis produktadon nur post okjara preparado, pro ĉikanado de la usonaj inĝenieroj, fuŝa mastrumado de feŭdaj burokratoj kaj nesufiĉo de kapitalo. Pro fraŭdado kaj laŭplaĉa disipado fare de la ŝtatoficistoj la teksejo suferis grandajn malgajnojn.

Por praktiki ekonomian monopolon la burokratoj pledantaj okcidentigon klopodis por akiri al si politikajn kaj ekonomiajn privilegiojn. Ekzemple, kiam Li Hongĝang fondis la Ŝanhajan Teksejon, li petis sankcion de la registaro, ke privataj komercistoj rajtas nur investi al la jam fondita teksejo, sed ne fondi novan memstare, dum dek jaroj. Poste estis plie difinite, ke en la tuta lando “dum dek jaroj estas malpermesite pliigi spindelojn kaj teksilojn” krom la jam funkciaj. Tio malhelpis kaj malebligis la disvolviĝon de la nacia industrio, reduktis la forton de la ĉina kapitalo en konkurenco kun la eksterlanda kapitalo favore al la eksterlandaj burĝoj en plivastigo de ilia merkato en Ĉinio. Por elturniĝi el la fiasko en prosperigo de la komerco la pledantoj por okcidentigo aplikis ankaŭ la sistemon de kuna administrado inter privatuloj kaj la registaro, sed ankaŭ tiu klopodo ne

donis la deziritan rezulton. Fine, el ilia “strebado al riĉiĝo de la lando” restis nur trompa ŝildo.

Post la sepdekaj jaroj de la 19-a jarcento imperiistoj intensigis sian agresadon al Ĉinio. Japanio, la cara Rusio, Britio, Francio kaj Germanio unu post alia okupis lokojn de niaj limregionoj kaj marajn havenojn, kaj la registaro de King-dinastio alfrontis novan seriozan minacon. Por defendi la dinastion la okcidentiga grupo plifortigis sian aktivadon kun starigo de novaj terkaj mararmeoj kiel la centro.

Ankoraŭ dum la tempo ĉe la finiĝo de la Dua Opia Milito la registaro de King-dinastio jam konsentis, ke la agresantoj helpu ĝin trejnadi la ĉinan armeon. Unue ĝi toleris per silento al usonano Ward organizi Fremdajn Musketajn Trupojn, kiuj estis reorganizitaj kaj plivastigitaj sub la nomo Ĉangŝenggjun en 1862, samjare permesis krome al unu franco kaj unu brito organizi novajn trupunuojn moderne ekipitajn, kiuj ludis nur ferocan kaj fian rolon en subpremado de la revolucio de la Tajping-a Ĉiela Regno.

Laŭ sankcio de la ĉefministro de King-dinastio en 1875, estis asignita la sumo de 4,000,000 da taeloj ĉiujare por starigi flotojn en dek jaroj por la norda, suda kaj orienta maroj. Kvankam ili starigis la mararmeon sub la ŝildo de rezisto kontraŭ la eksterlandaj agresantoj, tamen, kiam okazis vere milito kontraŭ agresantoj, ili plenumis la kapitulacian politikon, t. e. “malvenko certe estas malbono, tamen ankaŭ venko alportos nur komplikajojn”. Dum la Ĉina-Franca Milito 1884-1885, kvankam parto de patriotaj oficiroj kaj soldatoj brave batalis kontraŭ la malamikoj sur la maroj, tamen sub la kapitulacisma linio kaj pro la fakto ke la flotoj ĉiu komandata de aparta admiralo, unu ne submetita al alia, rezulte la Fugian-

a floto, multjare kulturita de la okcidentiga grupo komplete dronis en la maro kaj ankaŭ la sudmara floto suferis perdon.

La malvenko de Ĉinio en la Ĉina-Franca Milito signis la unuapaŝan bankroton de la okcidentiga agado. Sed Li Hongĝang ne nur ĉerpis nenian lecionon el tio, sed ankaŭ ne domaĝis grandegan sumon por aĉeti novajn militŝipojn el eksterlando sub la preteksto ke la memfaritaj militŝipoj ne povas rivali kun la fremdlandaj, por rapidigi la konstruon de la Nordmara Floto.

Tiu floto estis ne nur armita per tekniko kaj ekipaĵoj de imperiismo, sed ankaŭ komandata kaj trejnata tute de fremduloj. Fakte, ĝi estis regata de britaj kaj germanaj imperiistoj.

El ĉio entreprenita de la okcidentiga grupo, la konstruado de la Nordmara Floto konsumis plej multe da tempo kaj mono. Kaj ili tre kon-

tentis pri la ŝajna potencigo. Li Hongĝang fanfaronis: "Koncerne la situacion de la pordo de Bohaj-marano nun ĝi jam estas neŝanceble fortika." Sed, kiel statis la fakto? En la jaro 1894 eksplodis la Ĉina-Japana Milito. Li Hongĝang metis ĉiujn siajn esperojn sur interpacigadon pere de imperiistoj, tial li malpermesis al la Nordmara Floto ĉian militpreparon. Kiam la unua batalo finiĝis malfavore al Ĉinio, li estis terurita de la arogantaj agresantoj kaj malpermesis al la Nordmara Floto elnavigi el Vejhajvej por fari militon. Poste ankaŭ la terarmeo de King-dinastio estis komplete venkita, kaj la Nordmara Floto falis en sieĝadon de japanaj militŝipoj kaj tute pereis.

Tiu malvenko tute deŝiris la maskon de "sinpotencigo" kaj "strebado al riĉigo de la lando" plejditaj de la okcidentiga grupo, kaj malkaŝis ilian reakcian putran esencon de

kapitulaco kaj naciperfido. Dum ilia 35-jara aktivado por okcidentigo, Ĉinio ne nur ne fariĝis riĉa kaj potenca, sed eĉ falis pli profunden en la abismo de duonkoloniismo. En tiu tempo la fremdlandaj agresantoj pliintensigis politike, milite kaj ekonomie sian superregadon en Ĉinio, kaj samtempe pli strikte ligiĝis kun la ĉinaj feŭdaj fortoj. La okcidentiga grupo fariĝis ĉiam pli kompradoreca*, kaj la fortoj de ĉinaj burokratoj-kompradoroj kreskadis paŝon post paŝo. Krome, kun la disvolviĝo de la moderna industrio ankaŭ la ĉina laborista klaso kreskadis. La bankroto de la okcidentiga movado atestis, ke Ĉinio povas vere riĉiĝi kaj potenciĝi nur, kiam la regado de imperiismo, feŭdismo kaj burokrata kapitalismo estas plene renversita.

* Kompradoro — Indiĝena komercisto servanta kiel aĉeta agente de fremda negocisto en kolonia aŭ duonkolonia lando.



La Fonto de Jangzi-rivero

de GIANG JUAN

LA rivero Jangzi kvazaŭ longa arĝenta drako kuŝas sur la meza parto de Ĉinio. Tra la provincoj kaj aŭtonoma regiono Kinghaj, Tibeto, Junnan, Siĉuan, Hubej, Hunan, Gianghi, Anhuĵ kaj Giangsu ĝi fluas en la Orientan Ĉinan Maron proksime de la urbo Ŝanhajo. Ĝi longas 5,800 kilometrojn kaj estas la kvara granda rivero en la mondo.

Kiam oni veturas per ŝipo de Ŝanhajo, turniĝas ĉe la buŝo de Huangpu-rivero orienten kaj rigar-

das la grandiozan pejzaĝon de la torentanta Jangzi-rivero ĉe la enfluejo larĝa je 80 km., ili pretervole demandas sin: Kie estas la fonto de la granda fluo? Kia pejzaĝo tie prezentiĝas?

Antaŭ nelonge, kun la sama penso mi venis al la fonto de Jangzi-rivero kune kun la Fontoesplora kaj Filmada Grupo de Jangzi-rivero.

Ni vojaĝis per aŭtoj okcidenten de Hining, la ĉefurbo de Kinghaj-provinco, kaj atingis la nove konstruitan urbon Gelmu ĉe la piedo de

Kunlun-montaro post veturado de 900 km. La urbo situas ĉe la sudorando de Cajdam-baseno sur la Kinghaj-Tibeta Ŝoseo. Kiam ni rigardis de tie la sudan Kunlun-montaron sin ŝovantan alte inter nuboj, ĝia grandiozeco profunde impresis nin.

Kiam ni trapasis la pasejon de Kunlun-montaro, etendiĝis antaŭ ni la Kinghaj-Tibeta Altebenaĵo kun siaj vastaj herbejoj. De la pasejo de Kunlun-montaro ĝis la pasejo de Tangla-montaro ĉe la limo inter

Kinghaj kaj Tibeto niaj aŭtoj veturis 450 km. sur la ŝoseo, kiu kuŝas sur la meza parto de la nomita altebenaĵo, kies plej malalta loko superas 4,500 metrojn super la mara nivelo. Ambaŭflanke de la ŝoseo kontinuas grandarea tero de jaroj frostita.

La areo inter Kunlun- kaj Tangla-montaroj estas fonta regiono de Jangzi-rivero. En la regiono malrapide fluas kvin riveroj Ĉumar, Tuotuo, Gar, Bu kaj Dang en formo de ventumilo de okcidento al oriento laŭ la deklivo en larĝaj valoj. Ili formis la ĉefan fonton de Tongtian-rivero — la supra parto de Jangzi-rivero. Kiu el ili estas la fonto de Jangzi-rivero? Laŭ la teorio, “la plej longa estas la fonto”, do la plej longa Tuotuo-rivero havas la honoron esti la fonto kaj aliaj estas branĉoj.

Laŭ Tuotuo-rivero sur gruza bordo ni iris supren, post piedirado de 3 horoj ni venis al valo inter du neĝmontaroj. La okcidenta estas neĝmontaro de Gakiadijugang kaj la orienta estas tiu de Geladandong, kiuj ambaŭ apartenas al Tangla-montaro. En la valo estas multaj sinsekvaj marĉoj kaj ambaŭflanke de la valo estas pli ol 20 montvalaj glaciriveroj de diversa grandeco. Pro la lastatempa moviĝo de la montoj, la buŝo de la valo abrupte malleviĝas kaj formas ravinon altan je pli ol 20 metroj, sed interne de la valo la riveraj bordoj estas ebenaj kaj larĝaj, la fluo estas malrapida kaj oni povas vidi klare gruzojn en la akvo. Pli ol 40 kilometrojn antaŭen ni atingis la fonton de Jangzi-rivero — la glaciriveron Gianggendiĵu sudokcidente de la neĝmontaro Geladandong.

Geladandong-neĝmontaro konsistas el 21 neĝmontoj, kies alteco superis 6,000 metrojn super la mara nivelo. Ĝi estas ne nur la ĉefa pinto de tiuj neĝmontoj sed ankaŭ tiu de

Tangla-montaro. La neĝmontaro longas de la nordo ĝis la sudo pli ol 50 kilometrojn kaj larĝas de la oriento ĝis la okcidento 20 kilometrojn. La areo de ĝia neĝkovro superas 600 kvadratajn kilometrojn kaj ĝia neĝa linio altas je 5,800 metroj. En ĝiaj montvaloj evoluas ĉ. 40 valaj glaciriveroj. Tiuj glaciriveroj de la neĝglacia regiono super la neĝa linio kuniĝas kaj radiforme disetendiĝas. La degela regiono sub la neĝlinio de la glaciriveroj estas glaciaj langoj, etendiĝantaj al montvaloj pro tio ke la ambaŭ randoj proksimaj al nudigitaj rokoj kaj gruzejo, kiuj sorbas pli multan varmon kaj kie la degelado estas pli forta.

Okcidente de la neĝmontaro, la montpiedo de Gianggendiĵu-montaro pli ol 6500 metrojn alta super la mara nivelo estas tenajle premata sude kaj norde de du glaciriveroj. La suda glacirivero longas 12 km. kaj larĝas malpli ol 2 km., kaj la norda longas 10 km. kaj larĝas pli ol 1 km. La glaciaj langoj de la du glaciriveroj formis pro degelado multajn kuriozajn kaj belajn glaci-fostojn, kiuj krute levas sin alte 10-20 metrojn kaj surhavas multajn glaciajn pendadojn. La glacio gustas amare pro alta enteno de mineralaj elementoj. La degelinta akvo de glaciriveroj rekte falas malsupren laŭ la krutaĵoj kiel akvofalo. La suba parto de glacia krutaĵo estas nigra pro enhavo de tero kaj sablo. La akvo de la du glaciriveroj formas la originan fonton de Jangzi. Veninte ĉi tien, ni sentas ke “la senfina riverego ja komenciĝas de sub niaj piedoj”.

Post finiĝo de la lasta glacia periodo de la kvaternaro, la monda klimato fariĝis pli varma, tieaj glaciaj langoj retiriĝis iom post iom, la gruzoj entenataj en ili delasiĝis amase formante montetojn. Interfendoj sur tiuj montetoj kreskas abunde la rara planto — neĝlotuso.

Starante sur montodorso inter la du glaciriveroj, ni vidis la du glaciriverojn kuŝantajn en valoj kvaŝaŭ blankaj rubandoj. Sur la glaciriveroj staras amase glaciaj fostoj kiuj arĝente brilas sub la suno tre bele kaj kurioze.

La akvo de la du glaciriveroj malrapide fluas nordokcidenten laŭ larĝaj valoj plenaj de gruzoj, post 3-4-kilometra fluado ili kunfluas iom post iom norden, post plia ĉ. 6-kilometra fluado la akvo kuniĝas kun la fluo venanta de la piedo de Gakiadijugang.

La nomita neĝmontaro situas okcidente de Geladandong kaj estas iom pli malgranda. Ĝia ĉefa pinto altas 6,500 metrojn kaj ĝiaj aliaj 13 neĝmontoj pli ol 6,000 metrojn super la mara nivelo. Ĝia nedegela areo estas ĉ. 150 kvadrataj kilometroj. Ĝi havas 19 glaciriverojn kaj tiuj sur ĝia okcidenta flanko estas pli longaj kaj ilia akvo fluas en la salan lagon Ĉibuĝang. La akvo de ĝiaj relative mallongaj orientaj glaciriveroj fluas nordorienten kaj kunfluas kun la akvo de la supre nomita Gianggendiĵu-glacirivero. Post kunfluiĝo de la orienta kaj okcidenta fluoj ĝi trafluas la supre diritan gruzan regionon kaj turnas norden. Tiamaniere, kiel la fonton Jangzi-rivero ricevas la degelan akvon de la neĝmontaroj Geladandong kaj Gakiadijugang.

En la fonta regiono de Jangzi-rivero ne nur troviĝas abunda neelĉerpebla akvo en solida formo kaj multaj maloftaj animaloj kaj plantoj, sed ankaŭ minerala riĉfonto. Kun la disvolviĝo de niaj sciencaj aferoj, ĝiaj riĉfontoj ankaŭ kontribuos al nia socialisma konstruado.

La esplorado montras, ke Jangzi-rivero trovas sian fonton en sudokcidenta flanko de Geladandong — la ĉefa pinto de Tangla-montaro.

Fiŝbredado en dolĉa akvo

Sciencistoj de la Guangdong-a Akvoprodukta Instituto kaj laboristoj de la Kantona Eksperimentejo pri Fiŝbredado en Dolĉa Akvo akiris sukcesojn en sciencaj esploroj pri kulturo de fiŝidoj, bredado de fiŝoj en fluanta akvo, prilaboro kaj utiligo de nutraĵoj, selekto de bonrasa fiŝo, plimultigo de novaj specioj kaj fiŝkaptado en akvokonservejo k. a. kaj sukcesis en arta generado de fiŝoj bredataj en cisterne.





La ŝlosilaj problemoj de elimino de malpuraĵoj kaj konvena flukvanto de akvo por densege bredi fiŝojn estis solvitaj.

Inĝeniero Gong Lin (la dua de dekstre) instruas al teknikistoj kaj laboristoj la teknikon de arta elovigo de cisterne bredataj fiŝoj.




Rapidigo de kreskado de planktono per konvena kvanto da amonia akvo por grandigi la produktokvanton de fiŝoj.





Konstruado de ponto en nokto



Vojkonstruado por la patrolando


Timante nek malfacilojn nek laciĝon kaj perdante neniu sekundon la fervojaj armeanoj konstruas fervojon sur altebenaĵo kaj en dezerto de la patrolando malgraŭ manko de oksigeno kaj akvo.

Tunelo sur nordokcidenta altebenaĵo en konstruado


Konstruado de fervojo en dezerto




Tibetanoj ĝojas pro etendiĝo de fervojo al la altebenajo




Konstruado de nova stacio ĉe la piedo de la Granda Muro






Kvadrata sunenergia forno el kalcia plasto taŭga por uzado en kamparo estas sukcese farita de la 15-a Radiaparata Fabriko de Sanhajo.

Aparatoj por utiligo de suna energio



Sunenergia aparato en formo de ondolado por varmigi akvon estas farita de barbiroj mem de la Hinhin-a Barbirejo de Ŝanhajo. Ĝi povas liveri akvon varman je 40°-60° C.




Sunenergia nigra lampo por mortigi insektojn dum nokto en regionoj sen elektra fonto estas sukcese farita de la Hinhua-a Lumigila Fabriko de Ŝanhajo.

La Nacia Festo



En Ĝongŝan-parko de Pekino



Dancado en ĝojo



Geknaboj en la Festo




Boatoj sur lago





Leona kaj draka dancoj



Ĝojego en nokto







Centmiloj da popolanoj
ĝoje celebras la Feston
sur Tian-anmen-placo.

La fonto de Jangzi-rivero



En Geladandong-negmontaro estas la fonto de Jangzi-rivero



Tuotuo-rivero, supra parto de Jangzi-rivero

Glacia ponto en la neĝmontaro



Glacirivero de kiu fontas Jangzi-rivero



En la regiono de la fonto de Jangzi-rivero estas vasta stepo kaj marĉoj, kaprica klimato kaj mirindaj pejzaĝoj.



12859

